1982 novembro
75-a jaro
n-ro 923 (11)
aperas monate (escepte de aŭgusto)

esperanto

ISSN 0014-0635

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun unesko)
nieuwe binnenweg 176 — 3015 bj rotterdam — nederlando

Bulgaraj esperantistoj havas propran palacon

Vi trovos

mankon de la respondo al tiu via demando, kiun vi afable bonvolis tamen ne starigi al ni. Dankon, ke vi eltenis novembron sen la novembra! Ankaŭ ni iel sukcesis elteni la monaton kun ĝi. Pretere dirite, estas bele kiam homoj grumblas pro iuj periodaĵoj, kiuj malfruas. Tiuj plendoj estas pruvo, ke oni atentas kaj eventuale eĉ legas la koncernan gazeton. Sed, kial ĉiam nur legi? Provu foje ankaŭ fari ion, ne gravas ĉu en la lingvo aŭ en la Movado. Ĉu vi iam gustumis la korespondadon? Aŭ vi subite komencas kredi, ke sufiĉas kvazaŭ korespondi kun ni pere de ĉi tiu rubriko? Eraro. Provu aranĝi, ke tio ne sufiĉu, ĉar nia celo ne estas tia. Cetere, iu ja devus reagi al la korespondanoncoj en ĉiu nia numero. Ĉar estas tiel triste "serĉi gekorespondantojn tutmonde, pri ĉiuj temoj", kaj trovi neniun. Kio do okazas kun ĉi tiu mondo? Ĉu oni ankaŭ ĉe vi komencas interesiĝi nur pri la (jes, ĉiuj) televidaj programoj kaj militminacaj novaĵoj en la radio kaj gazetaro? Por la kazo, ke decembro ial malfruos ĉi-jare, havu jam nun iom da novjaraj salutoj. Sunbrilo subite ĉi tie ĉe ni!

Enhavo

181 Landa agado: Kiel harmonii kun Rondo Harmonia? (Simo Milojević)
182 Parlamenta agado: Interparlamenta Esperanto-Grupo
183 Ekde 1983 aperos facila revuo: "Kontakto" kun tekstoj por komencantoj (Anna Brennan)
184 Pupteatra Internacia Festivalo: PIF estas 15-jara (Spomenka Štimec)
185 Enketo pri la 67a UK: Antverpenaj postpensoj (D. Masterman kaj Dai Song-en); Lingvo: La landnomoj en la Akademio
186 Riĉa informa rikolto (D. Masterman)
187 Internacia Esperanto-Kursejo en Pisanica: Esperantista palaco en Bulgario (Marija V. Diĉeva); Regiona agado: Esperanto-organizaĵo en Reunio
188 Kalendaro: Kien iri ĝis marto?
189 Kongresa komuniko (novaĵoj pri la 68a Universala Kongreso en 1983)
190 Recenzoj: "Provo de gramatiko de novjuda lingvo..." de Zamenhof /Holzhaus (G. Sutton); "Plurnacia bukedo", "Karnavale", "Kantu kaj lernu", "Estis pli bona tempo" de Sylla Chaves (L.G. Nordenstorm); "Ĉu ŝi mortu tra-fike?" de J. Balano (D.K. Jordan); "Misio sen alveno" de John I. Francis (P. Daŝgupto); "Makedona antologio" kaj "Por la makedona lingvo" (K. Schubert); "Israelo kantas" (M. Haase); "La krabo kun oraj pinĉiloj" de Hergé (L.G. Nordenstorm); "Boule de suif" de Maupassant/De Diego (L.H. Knoedt); "La sentimulo" de Cooper/Imbert (K. Schubert)
194 Laste aperis. . . (novaj eldonaĵoj en aŭ pri la Internacia Lingvo)
196 TEJO-paĝo: Nova periodaĵo de TEJO: "TEJO tutmonde" en 1983 (Paul S. Hopkins); Nuna Estraro de TEJO
197 Nekrologoj (J.T. Allan, W. Behrmann, V. Bhave, O. Eklund, P. Hermanns, L. Kielpińska, M. King, M. Laade, S. Minkov, W.C. Nelson, S.N. Podkaminer, C. Trésorier)
198 Loke – Fake – Persone (mallongaj novaĵoj)
199 Oficiala informilo de la Centra Oficejo de Universala Esperanto-Asocio Esperanto en radio
200 Anonco; Anoncetoj

La kovrilo

Pisanica – estas la nomo de la bulgara loko en kiu troviĝas la impona konstruaĵo, kiu ĉi-foje okupas nian kovrilan paĝon. Ni ne havis bulgaron ĉe-mane por deĉifri la signifon de tiu nomo. Vortaroj ne multe helpis. Ni legis tie, ke la nomo povus deveni el la vorto "skribi", same kiel el alia bulgara vorto uzata por karese alparoli katojn. Petu do foje iun bulgaron klarigi al vi la devenon de la nomo Pisanica. Ankaŭ ni faros. Intertempe, admiru la plej belan konstruaĵon en la movada mondo kaj legu la tekston pri ĝi sur la paĝo 187.

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, Nwe Binnenwg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. **Telefono:** (010) 36 15 39.

Aperas monate (escepte de aŭgusto). **Fondita** en 1905 de M.P. Berthelot (1881-1910). **Legata en 102 landoj.**

Redaktoro: Simo Milojević.

Abonprezo varias laŭlande. Petu de via landa asocio aŭ de la ĉi-supra adreso. Unuopa ekzemplero 4,– gld.

Anonctarifo (gld.): 1p. 1000, 1/2p. 530, 1/4p. 290, 1/8p. 170, 1/16p. 110. Instancoj kaj entreprenoj de la Esperanto-movado rajtas rabaton de 50%. Eksterakovrilaj anoncoj kostas duoble. Ripetrabato 20%.

Banko: Bank Mees & Hope, Coolsingel 93, 3012 AE Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804).

Poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (UEA).

Telegramadreso: ESPERANTO ROTTERDAM.

Estraro de UEA

Prezidanto kaj estrarano pri financo kaj administrado: s-ro Grégoire Maertens, Pr. Leopoldstr. 51, B-8310 Brugge, Belgio; tel. (050) 35 49 35.

Vicprezidanto kaj estrarano pri planado kaj landa kaj regiona agado: d-ro Renato Corsetti, via Collazia 21, I-00183 Roma, Italio.

Vicprezidanto kaj estrarano pri kulturo kaj edukado: s-ro Baldur Ragnarsson, Sogavegur 170, IS-108 Reykjavik, Islando; tel. (91) 3 73 01.

Ĝenerala sekretario: d-rino Flóra Szabó-Felső, Zója u. 5/b VII, 22., H-7624 Pécs, Hungario; tel. (72) 23-274.

Estrarano pri informado kaj delegita reto: s-ino Ursula Grattapaglia, Fazenda Escola "Bona Espero", BR- 77260 Alto Paraíso (GO), Brazilo; tel. (061) 226 8101 (en Brasília).

Estrarano pri kongresoj kaj virina agado: s-ino Eliza Kehlet, Heideweg 20, B-2120 Schoten, Belgio; tel. (03) 651 46 36.

Estrarano pri faka agado: s-ro Petâr Todorov, ul. Veĵen 2, ap. 10, BG-1421 Sofia, Bulgario; tel. 65 52 43.

Estrarano pri esploroj kaj eksteraj rilatoj: prof. Humphrey Tonkin, Stouffer College House, 3700 Spruce Street, Philadelphia, PA 19104, Usono; tel. (215) 387 8288.

Maandelijks tijdschrift "Esperanto", nr. 923(11), november 1982. Verantw. uitgever: G. Maertens, Pr. Leopoldstraat 51, B-8310 Brugge.

Kiel harmonii kun Rondo Harmonia?

FOJE (*Dum splena hor', ĉagrena hor'*, kiel dirus Kalocsay), mi pretas pensi, ke mi estis pleje utila al Esperanto antaŭ 25 jaroj, kiam mi instruis la lingvon kaj "produktadis" novajn esperantistojn. Tiu konfeso helpos al vi kompreni, kial mi el ĉiuj homoj, domoj kaj rondoj, vizite viditaj antaŭ nelonge en Japanio, nun voĉdonas por Rondo Harmonia.

Sed, kio ĝi estas? Kia rondo? Kun kiu ĝi harmonias? Tio estas malfacilaj demandoj. Multaj japanoj ne kapablas abunde informi pri ili. Eksterlandanoj eĉ malpli. Pluraj provis deĉifri la enigmon, kaj la rezulto estis nur kelkaj malfacile kombineblaj mozaikeroj. Tamen, la Rondo harmonias jam preskaŭ du jardekojn, kaj mi opiniis, ke indas fari plian provon de malmisterigo. Ĉar miaj tiurilataj klopodoj dum la japana kongreso ne portis novajn informojn, iam komence de mia lasta japana semajno, mi komencis turmenti plurajn telefonojn kaj homojn kaj ripetadi en tiu sabata nokto, ke mi la morgaŭan tagon simple volas kaj insistas renkontiĝi kun funkciulo(j) de Rondo Harmonia. Post horo aŭ simile, oni revokis por diri, ke s-roj Esaki kaj Morikaŭa rendevuos kun mi dimanĉon en Kioto.

Kiam mi renkontis la du sinjorojn, mi diris al ili, ke mi havas 31 demandojn pri Rondo Harmonia. Ili ŝajnis kredi, ke mi efektive faris enkapan liston de la demandoj, kaj mi akceptis la ludon numeri ilin, kun timo, ke la demandoj elĉerpiĝos antaŭ la anoncita nombro de numeroj. Montriĝis poste, ke ekmankis la numeroj kaj tial pluraj demandoj havis du aŭ pliajn partojn. Kion mi do lernis el la respondoj?

Rondo Harmonia fondiĝis komence de 1966 en Kioto, kiel 10-kapa studenta E-grupo. Ĝi nun konsistas el 42 grupoj aŭ rondoj tra la tuta Japanio, kiuj kune nombras preskaŭ 1500 anojn. El tiuj rondoj, 24 konsistas el studentoj, kaj la ceteraj 18 el urbanoj aŭ ne-studentoj. Fakte, Rondo Harmonia neas la ekziston de iaj organizitaj grupoj kaj insistas, ke ĝin konsistigas nur individuaj membroj, kiuj foje ariĝas, se ili jam loĝas en la sama loko. La organizaĵo eldonas propran gazeton, *La harmonio*, kies numeron 117 mi nun havas antaŭ mi. Ankaŭ propran lernolibron eldonis Rondo Harmonia, proprajn informilojn same. Kompreneble, okazas ankaŭ propraj renkontiĝoj, seminarioj kaj kunloĝadoj de Rondo Harmonia. Unu el ili okazis en Tokio ĝuste en tiu semajnfino, kaj la du funkciuloj frue forlasis ĝin por atingi la rendevuon en Kioto. Ĵus okazis varba kampanjo de la Rondo en 40 japanaj universitatoj kaj kolegioj por novaj kursoj de Esperanto.

Ĉio ĉi sonas kiel eta fabelo, ĉu ne? Verŝajne ankaŭ pluraj japanaj movadanoj ne sciis ĉiujn ĉi detalojn. Sed mi daŭrigas demandi kaj ekscias, kial s-ro Iĉikaŭa dum la lastaj jaroj bezonis dekojn da ekzempleroj de *Plena analiza gramatiko*, de *Gvidlibro por supera ekzameno*... ktp. Li gvidas la libroservon de Rondo Harmonia. Ĝenerale, mi ricevas la impreson, ke Rondo Harmonia estas iaspeca fabriko de novaj esperantistoj en Japanio. Plurdekoj aŭ centoj aldoniĝas ĉiujare. Ili lernas kaj foriras. Ne en iun alian movadan organizaĵon sed plej ofte en la vakuon, en la vaston de la ekstermovada homa maro.

Miaj kunparolantoj jesas al la demando, ĉu Rondo Harmonia fondiĝis kiel iaspeca opozicio al la cetera E-movado en la lando. Ĉu tio signifas, ke ne konvenis al via agado la ekzistanta, tradicia strukturo, demandas mi. Jes, diras ili, ĉar la Rondo konsistas el junaj homoj. Vi du ne plu estas tiel junaj (ambaŭ elektronikaj inĝenie-

Centoj da junaj homoj en Japanio sukcesas flegi sian intereson pri la Internacia Lingvo sen internacie uzi ĝin kaj evitante kunlabori kun la cetera movada mondo: Parto de la membraro de Rondo Harmonia dum kunloĝado en Tokio pasintjare.

roj, en la aĝo de 30 ĝis 40 jaroj), atentigas mi, kaj demandas, ĉu nun ili ne komencas ĝeni la pli novajn, ekzemple la 18-jarulon, kiun ni kune renkontis tiun posttagmezon, kiu nomis sin Sano kaj aspektis tiel. Ne, diras ili.

Mi estas konfuzita pri Rondo Harmonia, kiu fascinas min. Bedaŭrinde, ke ne plu estas tiu dimanĉa posttagmezo en Kioto. Mi havus pliajn 31 demandojn al s-roj Esaki kaj Morikaŭa. En tiu numero de *La harmonio* mi nun legas: "Ni pensas, ke memkonscio progresigi Esp-movadon estas grava. . . kaj ni povas sukcesi. . . nur per la plimultigo de esperantistoj konsciantaj la signifon de lingvo internacia kaj ĝia movado. . . , ni kreskigas tiajn esperantistojn. . ."

Nun, monatojn poste, mi ankoraŭ pensas pri Rondo Harmonia, tiu dua "landa asocio" de Japanio, tiu grandega "landa sekcio" ekster TEJO. Do, ankaŭ en Japanio okazas tiaj aferoj: ĉiu volas havi sian organizaĵon. Vole-nevole mian kapon invadas la aliaj landoj kun asociabundo: Aŭstrio, Svislando, Brazilo, Francio, Svedio, Nederlando, Germanio. . . Foje ili nomiĝas centroj, foje ligoj, rondoj, kluboj, unuiĝoj. . . Ĉiu eldonas sian lernolibron kaj verkas sian informilon, ĉiu forkonsumas duonon de sia buĝeto por havi sian propran bultenon, siajn proprajn membromarkfoliojn. Kiam ni fariĝos rondo harmonia? Kiam ni estiĝos "kunlaborlimtranspaŝa" klubo, kiel dirus germana konato, kiu malŝatas la ripetadon de la "de la" en la frazoj?

Ĉu Rondo Harmonia komencos harmonii ankaŭ eskterronde? Kiam ĝi pretos instrui al la resto de la Movado, kiel oni en 18 jaroj 150-obligu sian membraron? Ĉu ni aliaj pretas lerni? Ne nur enlande, sed ankaŭ internacie, survoje al la Centjara Jubileo. Mi ŝatus resti en harmonio kun Rondo Harmonia. **S. Milojević**

PARLAMENTA AGADO:

Interparlamenta Esperanto-Grupo

EN STRASBURGO (Francio), la 27an de oktobro ĉijare fondiĝis Interparlamenta Esperanto-grupo (IPEG). Temas pri nova iniciato sur la kampo de la parlamenta agado, kun la celo organizi la parlamentanojn, kiuj apogas la ideon de la Internacia Lingvo Esperanto. En IPEG povas membri deputitoj en la naciaj parlamentoj, same kiel anoj de interŝtataj parlamentaj instancoj, kia estas Eŭropa Parlamento, kun la sidejo ĝuste en Strasburgo.

Al la fondkunveno venis 13 eŭropaj parlamentanoj el Belgio, Britio, Francio, FR Germanio kaj Irlando. Pluraj aliaj esprimis bedaŭron pro maleblo ĉeesti kaj sendis siajn bondezirojn al la nova organizaĵo. La ĉefa ero en la programo de la fondkunveno estis prelego de inĝ. Heinz-Dieter Maas (FR Germanio), specialisto pri la maŝina tradukado, kiu parolis pri la lingva problemo en Eŭropa Komunumo. Post la prelego okazis vigla diskuto pri la kostoj kaj malbona funkciado de la nuna sistemo de tradukado kaj interpretado en la eŭropaj instancoj. Apartan atenton oni dediĉis al la ebloj enŝovi Esperanton en la lernejan programon de la ŝtatoj de Eŭropa Komunumo. La organizantoj de la kunveno estis surprizitaj, ke kelkaj el la parlamentanoj ne nur montris grandan intereson pri Esperanto sed esprimis pretecon ankaŭ lerni ĝin en rapida kurso.

La kunvenon iniciatis Brian Barker kaj Grahame Leon-Smith (kunlabore kun Eŭropa Esperanto-Centro en Bruselo), kiuj estas la ĉefaj organizantoj de la impona Brita Parlamenta E-Grupo, kiu nun nombras pli ol 140 anojn. Ne estis tial surprize, ke inter la 13 parlamentanoj plej multnombre reprezentiĝis ĝuste Britio, de kie venis ankaŭ la prezidanto de la fondkunveno, la eŭropa parlamentano Brian M. Key, kiu estis ankaŭ

Longa sperto en la E-agado inter politikistoj: G. Leon-Smith (maldekstre) kun brita diplomato en la 65a UK.

ĝia kunvokanto. Inter la ĉeestantoj oni rimarkis du politikistojn pri kiuj ni en la Movado scias, ke ili okupiĝas pri la lingva problemo en Eŭropo kaj montras grandan simpation al Esperanto: la parlamentano Ben Patterson (Britio) kaj la parlamenta konsilisto Yvo Peeters (Belgio).

Sonas amuze, ke la brita parlamentano Derek Enright invitis al sia strasburga oficejo, preskaŭ samtempe kun la fondkunveno de IPEG, tiujn, kiuj "volas reagi al la troa artefariteco en la nuna mondo". Tiu kunveno, tamen, montriĝis malsukcesa.

Kiel procedi plue, por amasigi Interparlamentan Esperanto-Grupon? Tion sendube scias la britaj aktivuloj el sia abunda sperto pri la starigo de la impona parlamenta grupo en tiu lando. Kiel en aliaj similaj kazoj, plej bone estus, se la landaj asocioj aŭ iliaj komisiitoj zorgus pri la agado sur ĉi tiu delikata laborkampo. Por kunordigi tiun laboron, oni skribu al : IPEG, Esperanto-Centro, 140 Holland Park Avenue, London, Britio W11 4UF.

Kontakto kun tekstoj por komencantoj

Antaŭ unu jaro aperis eksperimenta numero de nia revuo kun facilaj tekstoj por la komencantoj. Ĝi gajnis laŭdojn kaj mallaŭdojn. Aklamis ĝin tiuj al kiuj ĝi estis destinita, malaprobis la eksperimenton tiuj, kiuj de la plej vaste legata periodaĵo en la Internacia Lingvo atendas pli ol facilajn tekstojn por progresigi sian lingvouzon. Ambaŭ kategorioj de la reagintoj plene pravis: facila revuo estas bezonata, sed tiun rolon ne plenumu la revuo "Esperanto". Post funda konsidero de la bezonoj kaj ebloj, la estraroj de UEA kaj TEJO decidis doni la novan rolon al "Kontakto", revuo de la junulara sekcio de UEA. Ni petis la redaktoron de tiu novstila revuo, s-inon Anna Brennan, prezenti al niaj legantoj siajn planojn kaj dezirojn pri la facila periodaĵo.

EN RECENZO, kiu aperis en la oktobra numero de ĉi tiu revuo, Klaus Schubert skribis: ". . . infanoj kaj komencantoj estas du malsamaj literaturpublikoj". Lia recenzo temis pri materialo por la unua el tiuj du grupoj. Nun mi volas konsideri la duan, la komencantojn.

Kiam mi redaktis la facilan provnumeron de *Esperanto*, kiu aperis antaŭ precize unu jaro, mi celis montri, interalie, ke "facila revuo" ne estas sinonimo de "infana revuo". Laŭ la komentoj de la legantoj reage al la numero, estis evidente, ke multaj homoj ĝuis la numeron malgraŭ ĝia facila enhavo.

Ni eksciis la reagon de la legantoj al tiu numero per respondkarto, kiun ni dissendis kun la revuo. Ĉirkaŭ 10% de la legantoj resendis la karton. El tiuj, 76% indikis, ke ili deziras, ke aperu aliaj facilaj numeroj de *Esperanto*. Je la demando, kiom da fojoj en la jaro, la meza respondo (de tiuj, kiuj entute respondis jese) estis 5-foje. Iom pli ol duono indikis, ke ili volus regule ricevi tute novan revuon kun tia facila enhavo, se ĝi aperus.

Fakte, ne aperos aliaj facilaj numeroj de *Esperanto*, nek tute nova revuo. Anstataŭe ni decidis pri kompromiso: transformo de la junulara revuo *Kontakto*. Ekde la venonta jaro, proksimume duono de ĉiu numero de *Kontakto* aperos en facila formo, laŭ la samaj principoj uzitaj en la facila provnumero de *Esperanto*. La cetero havos la kutiman nivelon. Tio signifas, ke en unu revuo aperos materialo je diversaj gradoj de (mal)facileco, por ke novaj esperantistoj povu progresi de unu nivelo al la posta dum la jaro. Mi mem redaktos la facilan parton, dum la nuna redaktoro de *Kontakto*, Dario Besseghini prizorgos la ceteron. Ni kunlaboros por produkti unuecan revuon, tiel ke pri la temo elektita por ĉiu numero aperos diversnivelaj artikoloj.

Ideale, revuo por komencantoj devus esti malampleksa, sed aperi ofte. Alie oni riskas sufoki la novulon per apenaŭ digestebla amaso da materialo en fremda lingvo, eble ankaŭ en fremda alfabeto. La novstila *Kontakto* moviĝas en la dezirata direkto; ekde 1983 ĝi aperos 6-foje jare po 16 paĝoj anstataŭ 4-foje po 20. Se vi konsideras, ke la abonprezo restos sama, vi tuj konstatos, ke tio signifas gajnon por la legantoj.

Sur kiuj principoj baziĝos la facila parto de *Kontakto*? Same kiel ĉe la facila provnumero de *Esperanto*, ĉiuj artikoloj estos verkitaj laŭ vortolisto. La plej facilaj tekstoj uzos nur 520 morfemojn (inkluzive de gramatikaj eroj) dum la iom malpli facilaj uzos 1000. Surbaze de la praktika sperto, de la sugestoj de kunlaborantoj kaj, precipe, de "Frekvencmorfemaro de parolata Esperanto" de Zlatko Tišljar, ni reviziis la pasintjaran liston. Cetere, ni ankaŭ kontaktis Baldur Ragnarsson, kiu nun ellaboras vortoliston por la Elementa Ekzameno de UEA. Kvankam lia listo ne estos identa kun la nia (la bezonoj de redaktoroj kaj de ekzamenistoj ne estas ĉiam samaj), kandidato por la Elementa Ekzameno certe povos prepariĝi legante la facilajn partojn de *Kontakto*.

Se vi deziras verki por la nova *Kontakto*, vi povas ricevi ekzempleron de la vortolisto el la Centra Oficejo de UEA. Mi sugestas, ke instruistoj traduku la liston por siaj lernantoj, kiuj multe pli ĝuos la legadon, se ili ne devos konstante foliumi vortaron. Kaj tio estas nia ĉefa celo: la komencantoj povu legi rapide kaj kun plezuro.

Anna Brennan

Ekde 1983 "Kontakto" estos nova revuo, por homoj junaj en la vivo kaj novaj en la Movado. Novaj kaj modernaj temoj per facila, klara lingvo. Pli ofte, pli da paĝoj – sed la prezo sama!

PIF estas 15-jara

LA FESTIVALAJ FLAGOJ de la 15a Pupteatra Internacia Festivalo (PIF) estas malhisitaj. Pupistoj kaj esperantistoj, kiuj kolektiĝis en Velika Gorica apud Zagreb (Jugoslavio) de la 6a ĝis la 10a de oktobro, por ĉeesti tiun tradician oktobran renkontiĝon, rehejmiĝis. PIF riĉiĝis per aldonaj 42 prezentaĵoj, el kiuj duono en Esperanto. Ĉi-jare partoprenis 13 ensembloj el 7 landoj. En Esperanto ludis Pupteatro el Galati (Rumanio), "Gruppo Drammatico Vegetale" el Mezzano (Italio), la solisto Giorgio Pupella el Ĝenovo (Italio) kaj Pupteatro el Banjaluka (Jugoslavio). En diversaj lingvoj, kun fojaj Esperantaj klarigoj, ludis la teatro "Petrusjka" el la norvega urbo Trondheim kaj la solistoj Percy Press el Londono kaj Cveto Sever el Kranj (Jugoslavio).

El la arta vidpunkto, la jubilea festivalo ne liveris prezentaĵojn, kiuj estus je la nivelo de la pasintjara, spirhaltiga *Metamorfozoj* de Ovidio en la plenumo de la teatro el Konstanco (Rumanio). Sed la ĉi-jara PIF denove prezentis tutan gamon de ĉiuj eblaj pupteatraj stiloj: de dumiljaraj kolorigitaj ombroj de hinda pupteatro el Madraso, ĝis majstre movataj marionetoj de Stan Parker el Londono. Ne mankis ankaŭ tradicia foirspeca pupteatro brita aŭ samtempa kunprezento de pupoj kaj aktoroj en rumana prezentaĵo *Sinziana kaj Pepelea*. Tian kunludadon tre trafe montris la norvega prezentaĵo *Tivolirkus* el Trondheim. Samrepertuare ĉeestis korvarmigaj submaraj mondoj de la juna itala grupo el Mezzano kaj poezieca manludado de la solisto Giorgio Pupella. Cetere, lia teatro portas la nomon "Krokodilo", kvankam li ludis en Esperanto!

PIF sursceneje estis ĉi-jare pli pupteatra ol Esperanta festivalo. Esperanto ne tiel ofte aŭdiĝis sursceneje, tamen jes en la festivala klubejo kaj en ĉirkaŭfestivalaj aranĝoj.

La lingva ĵurio – Isabel Santiago (Brazilo), Sándor Révész (Hungario), Gamal Dandesi (Libano) kaj Roger Imbert (Jugoslavio) – pleje aprezis la rumanan prezentaĵon, kiu krom la kolektiva premio gajnis ankaŭ tri individuajn premiojn. UEA helpis per sia aŭspicio kaj mone, por stimuli la uzon de Esperanto sur pupteatraj scenejoj. Kroma fonto de mono por la lingvaj premioj estis Kroatia Esperanto-Ligo. La faka ĵurio atribuis sian ĉefpremion al la zagreba teatraĵo *La ŝuisto kaj la diablo*, dum al la infana ĵurio (Esperanto-lernantoj el Bulgario, Hungario kaj Jugoslavio) pleje plaĉis la brita prezentaĵo *Pulĉinelo kaj Judita* de Percy Press.

La festivalo povis okazi dank' al la gastamo de familioj en Velika Gorica kaj Zagrebo, kie pupistoj, esperantistoj, komencantoj, krokodiloj kaj poliglotoj loĝis senpage ĉe cento da adresoj.

Iuj rimarkigis, ke ĉe la ĉi-jara PIF ne abundis prezentaĵoj en Esperanto. Jes, sed ili ankaŭ ne mankis. La



Poezieca manludado de la itala solisto Giorgio Pupella en la 15a PIF gajnis diplomon pro la plej sukcesa aktorado.

festivalo ne plu kondiĉas, ke Esperanto estu la sola oficiala lingvo por aliĝi. La teatroj estas liberaj mem elekti la lingvon en kiu ili prezentiĝos ĉe la festivalo, sed la prezentaĵojn en Esperanto oni ĉe PIF pli bone honorarias. Krom en Esperanto, kelkaj prezentaĵoj okazis en la lingvoj teluga, norvega, angla kaj kroatserba.

Kio restas post la 15a PIF? En Rumanio nova teatraĵo en Esperanto, en Italio eĉ du: mirakla *La vojaĝoj de Sindbado* kaj *Rakontoj de la suno kaj la luno*. Ĉu iu post PIF emos enprogramigi ilin ĉe aliaj Esperantaj kulturaj aranĝoj? Kredu min, gesinjoroj, ili estas interesaj, minimume tiom, kiom interesaj estas nacilingvaj prezentaĵoj en viaj teatroj. Ĉu mi estas senpartia, se mi diras, ke ili estas eĉ pli ol tio?

La organizanto de PIF, Internacia Kultura Servo (ĝi mem cetere festis en septembro sian dekjaran ekziston), profitis la interesiĝon de la gazetaro, radio kaj televido, por informi pri Esperanto. Oni tion jam dum dek kvin jaroj faras. Kaj el zagreba vidpunkto ŝajnas, ke iu tion aŭdas.

Spomenka Štimec



La avida Lokusta Reĝo el la rumana teatraĵo "Sianziana kaj Pepelea", kiu gajnis plurajn lingvajn premiojn en PIF.

ENKETO PRI LA 67a UK:

Antverpenaj postpensoj

Kiam ni en la septembra revunumero provis koncize raporti (legu: verdikti) pri la 67a UK en Belgio, ni notis tie plurajn kritikajn rimarkojn. Iuj sukcesis mislegi tion kaj en la kritikoj vidi malforton de la plej granda movada manifestacio. Estas ja tute male: kritikon eltenas nur bonaj aranĝoj, kaj tia la Kongreso en Antverpeno sendube estis. Kelkajn nekutime sukcesajn aspektojn de la Kongreso ni eĉ ne notis: la ekskursojn, ekzemple. Ni pensis (kaj restas ĉe tiu opinio), ke ni ne estas turisma entrepreno kaj ke tio ne meritas tutmovadan aklamon; ni ja havas aŭ devus havi aliajn prioritatojn, pro kiuj ni ekzistas kiel aparta organizaĵo, kaj pro kiuj cent homoj en la Tago de la Lernejo pli pezas ol mil kongresanoj en dek ekskursoj. Legu kion diras en enketo kongresanoj mem.

"LA ĜENERALA KONTENTO pri la 67a UK ŝajnas esti fakto," diras la septembra numero de *Esperanto*. Ĉu al la sama konkludo ni venos post trastudo de la enketiloj ricevitaj?

Malpli ol 10% de la ĉeestinta kongresanaro redonis la enketilon. Tre malmultaj programeroj estis komentitaj de ĉiuj. Sufiĉe multaj respondoj devis esti "interpretitaj". Bonvolu konsideri ĉion ĉi dum vi plulegas.

Oni povis aljuĝi poentojn al diversaj programeroj laŭ la kriterioj: 1 = tre malkontentiga, 2 = malkontentiga, 3 = meza, 4 = kontentiga, 5 = tre kontentiga. La meza valoro de la aljuĝitaj poentoj por ĉiuj kongresaj programeroj estas 3,86. Laŭ la program-kategorioj la poentoj dividiĝis jene: klerigaj programeroj (3,88), festaj kaj solenaj (3,66), kulturaj kaj amuzaj (3,95), movadaj (3,72), administraj (4,07).

Laŭ la poentoj por unuopaj eroj, la *Kongresa kuriero* okupas la unuan lokon, kaj la Junulara Debato la lastan. Ĝenerale, ni konstatis, ke la amuzaj programeroj estis por la enketitoj pli interesaj ol la movadaj. La diskutoj de la kongresa temo iris ne malbone (3,7 poentoj). Tamen, "tro da tempo estis uzita de la podianoj" kaj – ŝajnis al iuj – "la traktado de la kongresa temo estis kvazaŭ flanka, anstataŭ la centra ero de la Kongreso". Ankaŭ ĉi-jare la Esperantologia Konferenco kaj Internacia Kongresa Universitato trovis bonvenon. Interalie, la prelego de prof. C. Støp-Bowitz gajnis 4,5 poentojn. Oni tamen volas aŭskulti "prelegojn kun klara prononcado", kun "pli bonaj helpriMedoj", ĉar "la celo ne estas endormigi". La publika kunsido de la Akademio aparte plaĉis pro tio, ke "oni rajtis fari surpaperajn demandojn – bone por timemuloj! Oni respondis al la demandoj en bona humoro, saĝe kaj koncize kaj klerige." La interesiĝo pri la Tago de la Lernejo estis "evidente multe pli forta ol la planantoj antaŭvidis". Ĝi "estis bonega iniciato kaj daŭrigenda."

La plej grandan spektantaron altiris la Solena Inaŭguro, Malfermo kaj Fermo, kiujn oni esperas vidi estonte pli festaj, pli viglaj, pli koncizaj, kun pli da ordo, malpli da samenhavaj vortoj kaj en tempolimo. Oni ŝatis la Interkonan Vesperon (3,2), sed trovis la prezentitan programon ne taŭga, ĉar oni "volas ne aŭskulti, sed in-

LINGVO:

La landnomoj en la Akademio

LA KUNVENO de akademianoj ĉeestantaj en Antverpeno okaze de la 67a Universala Kongreso petis d-ron André Albault prezenti raporton pri la demando de la landnomoj al la prezidanto. En sia respondo d-ro Albault memorigis la duan bultenon de la *Aktoj de la Akademio* (1968-1974), kie estas troveblaj ne nur la du artikoloj kiuj utilis kiel unua raporto pri la temo, sed ankaŭ la decidoj de la Akademio mem: unue, la permeso donita al la uzado de la afikso **-io** kaj, due, listoj de landnomoj kaj landano-nomoj, kiujn "la Akademio decidis oficialigi kiel ekzemplojn . . . [ĉar ili] . . . estas sendube internaciaj, tradiciaj en nia lingvo, jam akceptitaj de la granda plimulto".

D-ro Albault plie informis siajn kolegojn, ke li ĵus transdonis la manuskripton de sia verko pri landnomoj al la eldonejo TK/Stafeto. Tiu verko – *Vojaĝo tra la landoj* – pristudas la moviĝon de la ideoj pri la temo de 1887 ĝis hodiaŭ. Plie, esenca aldono al tiu verko estas la "Glosaro pri landnomoj", rezulto de enketo pri landnomoj en 47 lingvoj okcidentaj, afrikaj kaj aziaj. Tiu glosaro montras la rimarkindan unuecon* de la monda landnomaro kontraste al la mizera ĥaoso de la Esperanta nomenklaturo. Laŭ ebleco tiu glosaro informos pri etimologio kaj pri la landnomoj uzataj en la lingvoj de la koncernaj landoj.

Certe ekzistas solvoj por eliri el la nuna ĥaoso. D-ro Albault volonte ricevos, cele al sia raporto por la Akademio, viajn rimarkigojn pri la temo. Lia adreso: D-ro André Albault, 32 av. Et. Billières, F-31300 Toulouse, Francio.

A.A.

---

* Oni tamen ne supertaksu tiun "unuecon". En aŭgusto ĉijare okazis en Ĝenevo la kvara Konferenco pri Normigo de Geografiaj Nomoj (tiajn konferencojn organizas Unuiĝintaj Nacioj ĉiun kvaran jaron). Ĉeestis specialistoj de 59 landoj; oni laboris dum semajnoj en kvin komisionoj (kaj uzis ses lingvojn), sed la progreso estis minimuma. Finnoj, ekzemple, insistas nomi Nederlandon *Alankomaat*, same kiel la resto de la mondo malatentas la nomon *Suomi* por la lando de la finnoj mem. **(Red. rimarko)**

terkoni". La Balo estis "bonvena vario" (3,5). La etoson de la Bankedo (3,9) oni taksis "familiara", sed la prezon alta kaj la servadon tro malrapida.

La Nacia Vespero kaj Internacia Muzika Vespero (respektive kun 4,1 kaj 4,3 poentoj) estis tre allogaj eroj. Ankaŭ la Kariljonkoncerto (3,7) kaj Orgenkoncerto (4,4) estis kontentigaj. La Internacia Ĥoro estis "tre bona sukceso". Oni tre kontentis pri la disponigo de unu tre taŭga teatro dum la kongresa semajno. La meza nombro de poentoj por la Teatra Programo estis 3,96. La hungara teatraĵo *Ĉi vi vidis jam la piedsignon de l' profeto?*, kvankam plej multe spektita kaj kun profesiaj aktoroj, gajnis malpli da poentoj ol la aliaj (3,7). Troviĝis laŭdoj, sed ĉefe plendoj rilate la enhavon. *Sen eliro* venkis ĉiujn per 4,4 poentoj; *La evento* gajnis 4,3; la Pupteatro 4,0; *Gastamo* 3,9.

Ĉi-jare, la elektitaj vidindaĵoj por la ekskursoj kaj la servado estis ĝenerale tre kontentigaj, sed ne mankas plibonigaj sugestoj pri kompetentaj esperantistoj-gvidantoj kaj limigo de vizitotaj lokoj dum unu ekskurso. Ne eblas citi poentojn ĉar ne estis sufiĉe da respondoj por juĝi ĉiun el dudeko da ekskursoj.

Riĉa informa rikolto

TRI TELEVIDELSENDOJ, 22 radioprogramoj, 49 artikoloj nederlandlingvaj, 20 franclingvaj, unu anglalingva, 26 diverslingvaj komunikoj gazetaj, 3 titolpaĝaj mencioj kaj 25 fotoj... Tio estis la rikolto de la Kongresa Gazetara Servo de la 67a UK nur en la amaskomunikiloj de la kongresa lando mem.

La estro de tiu fako de la laboro de LKK estis s-ro Ivo Durwael (cetere, prezidanto de la Esperanto-Societo "La Verda Stelo", invitinto de la UK al Antverpeno), kiu jam delonge flegas kontaktojn kun lokaj ĵurnalistoj. Tiun politikon evidente pravigis la rezultoj. Tri gazetaraj konferencoj okazis antaŭ la UK; la lasta altiris 14 ĵurnalistojn, kiuj havis eblecon starigi demandojn al membroj de LKK, la estrarano pri kongresoj kaj la KKS. Ĉar la ĵurnalistoj estis kaj nederlandlingvaj kaj franclingvaj jam regis iom internacia etoso en kiu Esperanto devis esti uzata por komuniki kun la ĵurnalistoj. Tiu konferenco okazis unu semajnon antaŭ la UK, kio ebligis al la ĵurnalistoj aperigi artikolojn dum la kongresa semajno post iom da preparado. Rezulte, aperis 16 artikoloj en belgaj ĵurnaloj inter la 19a kaj la 24a de julio, kaj oni dissendis 5 radiointervjuojn. La Kongresa Gazetara Servo subtaksis la interesiĝon kaj la farotan laboron dum la Kongreso mem, kaj bedaŭris la mankon de homfortoj por gastigi pliajn raportistojn kaj respondi al informpetantoj, kiujn stimulis la amplekssa raportado.

La organizantoj de estontaj kongresoj povas studi detalan raporton pri ĉi tiuj antverpenaj spertoj, profiti de la priskribitaj lecionoj kaj, espereble, adaptiĝi al la lokaj cirkonstancoj por rikolti similan sukceson.

DLM

Pri la "movadaj eroj" la enketitoj malmulte komentis. Se ni juĝas laŭ la poentoj, la "administraj eroj" estis kontentigaj. Tamen, plendoj kaj proponoj ne mankas. Oni multe aprezis la kombinon de *Kongresa kuriero* kaj *Heroldo de Esperanto*, sed bedaŭris pro foje "nesufiĉa kvanto por ĉiuj". Oni komplimentis la deĵorantojn, sed plendis, ke ĉe la komenco estis tro da atendantoj en vicoj. "Libretoj kun informoj pri restoracioj, butikoj, muzeoj kaj aliaj ĝeneralaĵoj estas tre taŭgaj". La enketitoj deziras, ke oni ne plu uzu UEA-kodon anstataŭ la tradicia kongresa numero. Estis pluraj sugestoj pri la insigno kaj anticipa sciigo pri la programo. Oni plendis kontraŭ fotistoj kaj la manko de spaco por kelkaj kunvenoj. Oni ege malkontentis pri la ĉijara "fasado de la kongresejo" kaj esperas, ke la ekste-

Montrofenestro de antverpena vendejo dum la kongresa semajno: Tiaj informaj elpaŝoj estis malmultaj.

raĵo de la kongresejo estos en la venontaj jaroj pli okulfrape signita per flagoj kaj koloraj afiŝoj.

Per la enketiloj ni analizis la konsiston de la respondintoj, el kiuj la plimulto (91%) estis eŭropanoj; la viroj estis pli multnombraj ol la virinoj (proporcie temis pri 63/37); la aĝogrupo de 46-60 estis la plej ofta; la meza respondinto jam partoprenis 6,1 kongresojn, unu jam ĉeestis 32!

Decas aldoni, ke en la enketiloj estis multaj laŭdaj kaj dankaj vortoj al la organizantoj, kvankam ĉi tie ni listigis ĉefe plendojn, kun la celo pli bone konscii pri la mankoj kaj fari la estontajn Kongresojn pli imponaj kaj kontentigaj. Unu kongresano trafe diris: "Mi bone scias kiel kompleksaj estas la preparoj por la Universala Kongreso. Miaj komentoj tute ne signifas, ke mi ne alte taksas la laboron de preskaŭ ĉiuj preparintoj."

DLM kaj DSE

Esperantista palaco en Bulgario

Jam de pluraj jaroj ni provis akiri materialon por prezenti al la legantoj la Internacian Esperanto-Kursejon en Pisanica, apud Smoljan en Bulgario. Nun, kiam ni estis preskaŭ rezignantaj pri tiuj klopodoj, venis la sekva teksto. Kvankam la artikolo malatentas raporti pri la rezultoj de la unuaj tri jaroj en la vivo de la Kursejo, ni scias el aliaj fontoj, ke tra la kursoj en Pisanica pasis multaj centoj (aŭ eble miloj) da geesperantistoj. Estas evidente, ke la impona bulgara Kursejo serioze konkurencas kun la franca Kastelo Grésillon kaj la svisa Gastejo Edmond Privat en La Chaux-de-Fonds. La konstruaĵo mem en Pisanica verŝajne konkursas por la loko de la plej granda moninvesto iam farita por la bezonoj de la Esperanto-movado. Estus domaĝe, se Pisanica restus plejparte vojaĝcelo de bulgaroj kaj orienteŭropaj esperantistoj, ĉar tiu unika entrepreno meritas vastan internacian populariĝon.

EN LA MEZA PARTO de la bela montaro Rodopoj en Bulgario, inter la domoj dissemitaj sur la krutaj altaĵoj, en Pisanica, apud la urbo Smoljan, troviĝas neĝblanka konstruaĵo de rava alpeca aspekto. Super ĝi staras granda verda lumstelo kaj sur la fronta fasado de malproksime vidiĝas la lumŝildo "Internacia Esperanto-Kursejo". Tiu valora akiraĵo por la bulgara kaj eksterlanda esperantistaro estas unika en la mondo – vera Esperanto-palaco en la montaro de la legenda traca muzikisto Orfeo.

La ideo pri la konstruado de la Esperanto-domo en Rodopoj ŝajnis nerealigebla fantaziaĵo, ĉar estis vere fantaziulo tiu, kiu generis la unuan projekton – la malnova Esperanto-aktivulo Jordan Jordanov.

Grandega estis lia lukto kontraŭ antaŭjuĝoj kaj aliaj obstakloj, kiujn li renkontadis survoje al la realigo de la ideo. Estis momentoj, kiam li devis oferi eĉ siajn proprajn monrimedojn por antaŭpuŝi la konstruadon, kiu daŭris de 1976 ĝis 1979. Necesis transporti multajn milojn da brikoj kaj tunojn da alispeca konstrumaterialo. Oni senĉese devis klopodi ĉe la registaraj kaj distriktaj financaj instancoj por ĉiu bezonata levo (bulgara monunuo). La elspezoj estis grandegaj: pli ol 1,4 milionoj da levoj (pli ol 4 milionoj da guldenoj, laŭ la nuna oficiala kurzo).



Jordan Jordanov: Jen la homo; pri lia verko vidu la kovrilan bildon de ĉi tiu numero.

Neimagebla estis la fakto, ke Jordanov, kiel gvidanto de la konstrulaboroj (li estis samtempe direktoro de Internacia Esperanto-Kursejo kaj prezidanto de la distrikta estraro de Bulgara Esperantista Asocio en la urbo Smoljan), dum la tuta tago laboris kiel konstrulaboristo, sen aldona pago. Vespere, eĉ ĝis noktomezo, Jordanov laboris en la oficejo por prizorgi la administrajn aferojn. Li uzis por la laboroj ĉiun dimanĉon, kaj ne forestis eĉ por siaj jaraj feriotagoj. →

REGIONA AGADO:

E-organizaĵo en Reunio

EN LA INSULO REUNIO, franca transmara teritorio en Hinda Oceano (ĉ. 800km oriente de Madagaskaro), ekzistas de post la 23a de oktobro ĉi-jare Reunia Asocio por Disvastigo kaj Praktikado de Esperanto, kies franclingva mallongigo estas ARDPE. Jam de multaj jaroj en la insulo (2500km^2, ĉ. 500 mil loĝantoj) vivas kelkaj personoj, kiuj pli frue lernis Esperanton. Tamen, ĝis nun preskaŭ nenio okazis rilate Esperanton en Reunio.

En aŭgusto ĉi-jare, regiona ĵurnalo intervjuis lokan esperantiston kaj aperigis duonpaĝan artikolon pri la lingvo. Kelkajn tagojn poste, la radio-stacio RF3 invitis du geesperantistojn (s-inon Savignet-Belhôte kaj la subskribinton) fari programon pri la Internacia Lingvo. Tiu 50-minuta elsendo okazis en septembro.

Tiuj du okazaĵoj vekis la intereson de pluraj personoj, kaj la "pli malnovaj" esperantistoj decidis fondi kun la "novaj" la Asocion, kies celo estas disvastigi Esperanton en la insulo kaj kune praktiki la lingvon. Ni dezirus kontakti ankaŭ la esperantistojn el la najbaraj landoj, kaj tiurilate jam vizitis nin delegitaro el Madagaskaro. Nia Asocio nun havas ĉ. 20 membrojn de plej diversa aĝo. Ni bonvenigus pliajn internaciajn kontaktojn je la adreso de: ARDPE, p/a s-ro Pierre Lelievre, 111A rue Marius et Ary Leblond, F-97430 Tampon, La Réunion.

P. Lelievre

Tamen, Jordan Jordanov ne estis sola en la granda laboro. Li estis subtenata, fervore kaj sindone, de preskaŭ 800 geesperantistoj el 16 Esperanto-societoj el la distrikto de Smoljan (15 el tiuj E-societoj estis fonditaj sub la gvido de J. Jordanov). Ili dediĉis pli ol mil libervolajn labortagojn al la konstrulaboroj de la Kursejo en Pisanica. Subtenis lin ankaŭ la gvidantoj de la bulgara Esperanto-movado, ŝtataj aŭtoritatoj kaj instancoj. Tiun subtenon ebligis interalie la fakto, ke multaj eminentaj funkciuloj en Bulgario mem estas esperantistoj kaj arde simpatias la agadon de la bulgara Esperanto-movado.

Kiam oni eniras la Kursejon en Pisanica, tiun veran Esperanto-palacon, frapas je unua rigardo la moderna kaj luksa aranĝo de ĉiuj ejoj kaj anguletoj: helaj klasĉambroj kun bonaj lernokondiĉoj, aŭdvida kabineto kun moderna ekipaĵo por 20 personoj, en ĉiu etaĝo elegantaj salonetoj kun televidilo, 60 dormoĉambroj (du-, tri-, 6- kaj 8-litaj, kun tualetejo kaj duŝo), 4 komfortaj apartamentoj kun ĉiuj oportunaĵoj.

La domo funkcias tra la tuta jaro kaj havas kapaciton por samtempe loĝigi 200 personojn. La vasta manĝejo proponas bongustaĵojn de la bulgara kuirarto. Ĉiun labortagon antaŭtagmeze okazas po 4 horoj da lernado de Esperanto. Posttagmeze oni faras interesajn ekskursojn: al Planedario en Smoljan, ripozloko Pamporovo (kie oni per dratfervojo atingas la montopinton Sneĵanka, 2200m super la marnivelo, kaj ĝuas admirindan panoramon), subtera rivero kaj la groto "Diabla Gorĝo" apud Trigrad, la vilaĝo Mogilica kun antikva laborejo. Foje okazas piedekskursoj al la pitoreska ĉirkaŭaĵo de la Esperanto-domo, sportaj ludoj, amuzaj vesperoj en bone ekipita diskoteko, projekciado de lumbildoj kaj filmoj, prelegoj pri la Esperanto-movado kaj pri Bulgario.

La partoprenkotizoj inkluzivas 14-tagan restadon (tranoktado, manĝoj trifoje tage, lernado de Esperanto, kultura kaj turisma programo). Kiam kursano loĝas en dulita ĉambro, li aŭ ŝi pagas 196 levojn (ĉ. 570 gld), en trilita 168, kaj en 6- ĝis 8-lita ĉambro 140 levojn.

La konstruaĵo de la Internacia Esperanto-Kursejo en Pisanica situas 1025 metrojn super la marnivelo. En la proksimeco troviĝas diversaj sportejoj. La Kursejo disponas ankaŭ pri ĉiuj necesaj laborkondiĉoj por konferencoj, kunsidoj kaj aliaj Esperanto-aranĝoj, landaj aŭ internaciaj. Pro la monta karaktero de la tereno kaj la forta influo de Mediteraneo, la klimato distingiĝas per milda vintro kaj freŝa somero.

Kun siaj ĉiam verdaj pinarboj, vastaj herbejoj, originala arkitekturo, komfortaj loĝeblecoj, vizitinda ĉirkaŭaĵo, riĉa kaj varia restadprogramo, kun la ebleco perfektigi sian konon de la Internacia Lingvo, la Internacia Esperanto-Kursejo en Pisanica estas io unika kaj tial spertinda. Skribu al nia koresponda adreso: Internacia Esperanto-Kursejo, pk. 791, BG-1090 Sofia, Bulgario.

Marija V. Dičeva

Kalendaro

Kien iri ĝis marto?

Tutjare
Kursoj, turismaj kaj kulturaj aranĝoj, Varna kaj Smoljan, Bulgario (Internacia E-Kursejo, pk. 791, BG-1090 Sofia)

Decembro
03-05 Kongreso de Brazila Konsilantaro de Esperanto, Brasília, Brazilo (BKE, Caixa Postal 07-1182, BR-70000 Brasília - DF)
10 Tago de Homaj Rajtoj
10-12 Venezuela E-ista Renkontiĝo, Caracas, Venezuelo (J.E. Bachrich, Apartado 3833, Caracas)
15 Zamenhof-Tago (LLZ naskiĝis en 1859)
27/01-02 Internacia Komputista Simpozio "Interkomputo-82", Budapest, Hungario (Interkomputo-NJSZT, Pf. 240, H-1368 Budapest)
27/01-03 26a Internacia Seminario de GEJ/4a Internacia Festivalo de GEA, Oberwesel, FR Germanio (Ursula Felhölter, Töpferstr. 20, D-4500 Osnabruck)
28/01-02 12a Vintra e-ista ferio, Budapest, Hungario (Budapeŝta Komitato de HEA, Pf. 153, H-1443 Budapest)
29/01-02 Renkonte al la Nova Jaro, Pisanica, Bulgario (Internacia E-Kursejo, Pk. 791, BG-1090 Sofia)
31 Kotizoj de la Universala Kongreso altiĝas

Januaro 1983
15-29 Vintraj Ferioj, Maria Alm, Aŭstrio (Turisma E-Centro, Troststr. 27/2, A-1100 Wien)
20-29 Skisemajno 1983 de IFEF, Bavara Arbaro, FR Germanio
26-30 Brazila E-ista Junulara Kongreso, Iporá, Brazilo (BEJO, Caixa Postal 11-1110, BR-70084 Brasília - DF)
29/02-12 Skiferioj de Aŭstra Fervojista E-Federacio, Werfenweg, Aŭstrio (AFEF, p/a J. Geroldinger, Römerweg 19, A-4072 Alkoven)

Februaro
25-27 Komuna Nederlanda E-a Kongreso, Driebergen, Nederlando (FEN, Hoeveweg 18, 8394 VR De Hoeve)

Marto
11-13 Internacia Foira E-ista Renkontiĝo, Leipzig, Germana DR (Organiza Komitato de IFER, Käthe-Kollwitz-Str. 115, DDR-7010 Leipzig)
25-27 Renkontiĝo por Esperanto-kolektantoj, Valtice, Ĉeĥoslovakio (s-ro Vláďa Hasala, CS-691 42 Valtice)
31 Limdato de la Belartaj Konkursoj 1983
31/04-03 43a Argentina E-Kongreso, Neuquen, Argentino (AEL, Casilla Correo 435, RA-8300 Neuquen)

KALENDARO APEROS DENOVE EN MARTO. Bonvolu sendi al la redakcio detalojn pri viaj movadaj aranĝoj. Memoru tamen, ke ni interesiĝas nur pri pli grandaj esperantistaj kongresoj, konferencoj, seminarioj kaj kunvenoj, kiuj havas minimume tutlandan aŭ internacian karakteron. Detaloj petataj laŭ la ĉi-supra modelo.

68a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO, Budapeŝto (Hungario) 1983 07 30 – 08 06

Konstanta adreso: Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Adreso de LKK: Pf. 193, H-1368 Budapest, Hungario

Alta Protektanto: S-ro Sándor Gáspár, vicprezidanto de la Prezidio de Hungara Popola Respubliko, akceptis esti nomita Alta Protektanto de la 68a Universala Kongreso. S-ro Gáspár estas ne nur vicprezidanto de Hungario, sed ankaŭ la gvidanto de la Landa Konsilio de Hungaraj Sindikatoj. Krome, li estas prezidanto de la Monda Federacio de Sindikatoj kaj delonge favora al Esperanto (en 1974 aperis intervjuo kun li en *Hungara vivo*).

Kotiztabelo: En periodo de ĝenerala monda inflacio estas ĝojige ekscii, ke estas **neniu altigo** de la kotizoj



Se la nombro de la kongresanoj en Budapeŝto estos tiel alta kiel oni nun antaŭvidas, por la grandaj kongresaj aranĝoj servos la apuda sporta salonego.

por la venonta UK. La plena tarifo en guldenoj (kune kun la ekvivalentaj prezoj en hungaraj forintoj) troviĝas sur la aliĝiloj, kiujn oni dissendis kun la oktobra numero de *Esperanto*. La aliĝiloj estas haveblaj ankaŭ ĉe la perantoj kaj landaj asocioj. Loĝantoj de la orienteŭropaj landoj notu, ke LKK faras specialajn aranĝojn kun la koncernaj landaj asocioj por peri viajn kotizojn. Orienteŭropanoj, do, turnu sin rekte al sia landa asocio; rumanoj kontaktu LKK (adreso supre); jugoslavoj turnu sin al la landa peranto.

Karavanaj aliĝoj: LKK planas profiti grandskale de la nova Karavana Regularo, kun la celo malaltigi la aliĝkostojn por orienteŭropanoj. Ankaŭ la cetero de la mondo povos profiti de tio! La ĉefaj avantaĝoj de karavana aliĝo estas:
– Ĉiu karavanano pagas nur laŭ la kategorio 5 en la koncerna periodo. (Tio povas ŝpari al nemembro de UEA kiu aliĝas en la 3a periodo 85 gld., 37,5% de la kotizo!)
– Karavana aliĝo estas, komence, nepersona. Karavanestro rajtas aligi karavanon en la 1-a periodo, kaj plenigi ĝin ĝis la komenco de la Kongreso; la aliĝkotizo restos tiu de la periodo en kiu li aŭ ŝi aligis kaj pagis. (Tiamaniere eblas ŝpari multe pli ol duonon de la kotizo de nemembro de UEA, kiu aliĝas post la fino de la 3a periodo.)
– La minimuma nombro por estigi karavanon estas 25, sed oni rajtas ŝanĝi la konsiston ĝis mallonge antaŭ la Kongreso.
Ĉiu karavano devas esti akceptita de la Kongresa Administracio antaŭ ol povi profiti de la speciala prezo. Petu ekzempleron de la Karavana Regularo ĉe la konstanta adreso jam nun.

IKU: Tiuj, kiuj deziras kandidatiĝi kiel prelegantoj en la Internacia Kongresa Universitato anoncu sin kiel eble plej frue al la sekretario de IKU, profesoro Bruce Arne Sherwood, 25 Engr. Res. Lab., 103 S. Mathews, Urbana, IL 61801, Usono, aŭ ĉe la konstanta adreso, de kie ekzemplero de la regularo haveblas. Sinanoncoj atingu la sekretarion ĝis la fino de 1982.

Ĉirkaŭkongresaj aranĝoj:
20 – 29 julio: "Olimpiaj Ludoj" de Esperanta Ŝak-Ligo Internacia (EŜLI) en Kalocsa. Organizanto: EŜGH, H-6300 Kalocsa, Hungario.
23 – 29 julio: Internacia konferenco de kristanaj esperantistoj. (Pliaj informoj ĉe LKK.)
24 – 30 julio: Somera Esperanto-Universitato en Gyula (21a Sesio). Ĝi havos du branĉojn: Faka kaj scienca aplikado de Esperanto; Metodiko kaj didaktiko de Esperanto-instruado. Organizanto: SEU, 48-as u. 11, H-5700 Gyula, Hungario.
20 – 29 julio: Internacia Renkontiĝo Naturamika. Organizanto: Pf. 2, H-7601 Pécs, Hungario.
Post la UK: 51a Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj estas planata. (Pliaj informoj ĉe LKK.)

Lastaj zamenhofaĵoj de Holzhaus

Provo de gramatiko de novjuda lingvo (ĉ. 1880) kaj **Alvoko al la juda intelektularo** (ĉ. 1901), de L.L. Zamenhof. Red. A. Holzhaus. Helsinki: Fondumo Esperanto, 1982. 159p. 21cm. ISBN 951 9005 48 X. Dulingva eldono: rusa kaj Esperanta. Prezo: 14,40 guldenoj.

Jen Adolf Holzhaus regalas nin – laste* – per disŝuto de pliaj zamenhofaĵoj. Temas pri du ruslingvaj manuskriptoj, kiujn oni transskribis kaj tradukis. Per tio, laŭdire, estas publikigitaj ĉiuj konataj verkoj de la iniciatinto de Esperanto.

La enkonduko de J. Kohen-Cedek interesokapte priskribas la historion de la jida lingvo. Kvankam li klarigas, ke li nur sur la unuaj paĝoj konservis la el la rusa laŭvortan tradukon "novjuda lingvo" (kontraste kun la "antikva juda", t.e. la hebrea), oni sur la postaj paĝoj tamen malprave ŝanĝis la ĝustan elrusigon, kiu ja estas "la jida". Simile, oni mallerte ellasis la difinan artikolon el la titolo, kiu devus legiĝi "Provo de gramatiko de la novjuda (jida) lingvo". Ĝia traduko de J. Kohen-Cedek fluas, kvankam kun iuj elementaj misuzoj de vortoj (ekz. "animalo" en la senco "besto").

Verŝajne verkita iam inter 1879-82, la traktaĵo donas klaran priskribon pri la jida gramatiko. Ni povas admiri la fortan, sendependan personecon de Zamenhof, kiu pretis eklabori por provi forigi la ĝeneralan malestimon al la jida, kiun senkaŭze kovis kaj judoj kaj nejudoj. Zamenhof celis preskriban, normigan gramatikon, ĉar tio grave mankis. Li proponis latinliteran skribsistemon. Ni tuj rekonas la supersignitajn literojn ć ń ś ź (ĵ). Jen ankaŭ Zamenhofa, universala saĝo pri bona stilo: "Oni priatentu la gramatikajn regulojn, sur kiuj baziĝas la lingvo. . . ne submetu sin al la propra persona kaprico, aŭ al okaza plumkuro, aŭ al reguloj de fremdaj lingvoj." Krome por literaturamantoj estas interesaj la rubrikoj "Pri la versfarado" kaj "Ekzemploj de jidaj proverboj kaj popoldiroj". Multaj frazoj kaj tekstoj komparas ĝustan kaj neĝustan lingvouzojn.

Aliloke Zamenhof skribis, ke li arde ŝatas la jidan lingvon, sed li tamen ekdubis, ĉu ĝi ". . . posedas ian estontecon, kaj ĉu ĝenerale, valoras, ke ni deziru al ĝi estontecon. . ." Preskaŭ la lastan sortobaton al tiu interesa germanida lingvo donis la hombuĉadoj fare de Hitler.

La dua manuskripto, *Alvoko al la juda intelektularo*, temas pri la hilelismo, la unua formo de la homaranismo. Unu ĝia centra tezo estas, ke la lingvo estas ĝuste tiu ligo, kiu faras tiun aŭ alian grupon da homoj popolo. Interese estas sekvi la pensofluon de Zamenhof, sed hodiaŭ la teksto povas utili preskaŭ nur al historiistoj. La traduko estas malpli bona, ol tiu de la unua manuskripto.

Ni vere ŝuldas al Adolf Holzhaus dankon pro lia grandega entuziasmo publikigi proprakoste gravajn historiaĵojn. Sed ankaŭ nun petolis lia konata kapricemo, ĉi-foje per enmeto de la ĉi-teme senrilata, afabla, germanlingva letero de Zamenhof al Johann Schleyer, la elpensinto de Volapuko, kun la originala teksto kaj traduko ankaŭ de ĉi ties broŝureto "Pri la fuŝlingvo de la pseŭdo-Esperanto". Ĉi tiujn oni jam aliloke publikigis, sed mi antaŭe neniam vidis la plenan tekston de la broŝuro. Ĝi ofte estas aparte amuza: "La pintangula signo super 5 literoj . . . estas tre malbela, ĝena kaj slava en Esperanto. . ." aŭ "La vortoj de Volapuko estas ĉiuj bone kaj facile elparoleblaj, . . . En Esperanto tamen aperas tre multaj malmolaj, malfacile elparoleblaj vortoj . . ., nome ajljn, akv', ankrjn, bestn, . . . Oni vidas: Esperanto devenas el Pollando."

Adolf Holzhaus (1892-1982), kiel junulo en la jaro 1916: Siajn lastajn vivjardekojn li dediĉis al gravaj zamenhofologiaj esploroj.

Geoffrey Sutton (Pekino)

* Adolf Holzhaus mortis la 9an de junio 1982. Vidu nekrologon en nia numero de oktobro.

Brazila muzika skolo

Plurnacia bukedo, de Sylla Chaves. Rio de Janeiro: BEL, 1981. Kaseto kun tekstolibreto (7p. 16cm). Dek kanzonoj kaj 8 instrumentaj eroj el muzika teatraĵo, originale verkita en Esperanto. Prezo: 27,00 gld.

Karnavale, de Sylla Chaves. Rio de Janeiro: BEL, 1981. Kaseto kun tekstolibreto (11p. 16cm). Ok kantoj en Esperanto kaj en la portugala. Kantas Joel de Castro k.a. Prezo: 27,00 gld.

Kantu kaj lernu. Trad. el la angla, franca kaj portugala S. Chaves. Rio de Janeiro: Sono-Viso kaj Brazila E-Ligo, 1980. Disko. 18cm. 33t/m. 11 kantoj, kun tekstoj. Kantas J. de Castro, F. Fenati k.a. Prezo: 7,80 gld.

Estis pli bona tempo/Houve tempo melhor, de S. Chaves, Lopes kaj Altair. Kantas J. de Castro. Rio de Janeiro: Liga Brasileira de Esperanto kaj Sono-Viso, 1981. Disko. 18cm. 33t/m. Du kantoj en Esperanto kaj la portugala. Tekstoj surkovrile. Prezo: 7,50 gld.

Aperis subite tuta kolekto da kasedoj kaj diskoj esperantlingvaj en Brazilo. Temas pri brazilaj kaj alilandaj popularaj kanzonoj. Laŭdindas la muzika kvalito de ĉiuj ĉi eldonaĵoj, ĉar ĝi atingas profesian nivelon.

Plurnacia bukedo estas kolekto da ĉefe eŭropaj kantoj diversnaciaj. La tradukoj estas bonaj, ĉar la kanzonoj ne estas simple tradukitaj sed rekreitaj en Esperanto. La lingvaĵo ŝajnas tute natura, kio gravas kiam temas pri popularaj kantoj. *Karnavale*, male, enhavas nur brazilajn kanzonojn. Ili aperas kaj en Esperanto kaj en la portugala. La medio de la kantoj estas – kompreneble – la karnavalo en Rio, pri kio atestas tiel la tekstoj, kiel la ritmo de la muziko.

Kantu kaj lernu enhavas folklorajn melodiojn kun originale Esperantaj tekstoj, el kiuj kelkaj estas arde verdismaj. *Estis pli bona tempo* donas al ni eblon aŭskulti du kantojn: unu pri la estonto de la homaro, la alia pri la karnavalo, ambaŭ kaj en Esperanto kaj en la portugala.

La brazila muzika movada skolo, kiu ekestas per tiuj ĉi kaj kelkaj pli fruaj eldonaĵoj estas bonvena aldono al nia Esperanta kulturo. Ĝiaj trajtoj estas bona muzika kvalito, popularaj tekstoj kaj arda ritmo. Malavantaĝo pri tiuj ĉi eldonaĵoj estas, ke kelkaj kanzonoj aperas kaj sur disko kaj sur kasedo. Mi tamen volonte aŭskultis la kantojn multfoje.

Leif Gunnar Nordenstorm (Svedio)

Ĉu Valano estas Balano?

Ĉu ŝi mortu tra-fike? Priseksa kaj prikrima fantaziaĵo, de Johán Balano (pseŭdonimo). Antverpeno/La Laguna: TK/Stafeto 1982. 92p. 21cm. ISBN 90 6336 027 4. Prezo: 18,60 gld.

Jen en formo de krimromano el la fama serio "Ĉu" de Johán Valano, la unua libro de "Johán Balano", pornografia satiristo. Entuziasmaj legantoj de Valano memoras Janon Karal, policiston, kaj ties edzinon Ĝoja, psikologinon de la Psikosociala Centro. La libro de la pseŭdonima pornisto pritraktas problemojn de unu el la klientoj de Ĝoja. Lia psikologia kaj fiziologia problemo estas seksorgano de 48 centimetroj. Lia polica problemo estas tio, ke kelkaj virinoj murdiĝas penetrite de ĝuste tiom longa objekto.

Satiro malfacile sukcesas, se ĝi ne reliefigas por ni la pririndajn pretendojn de iu originalo. La lingva stilo de la valanaĵoj estas pli imitinda ol ridinda, kio ne simpligas la klopodojn de eventuala satiristo. Kiel satiro, ĉi tiu libro do iom fuŝas: ĝi sukcese ekspluatas kelkajn malfortaĵojn de tipaj valanaj intrigoj, sed ne ridindigas efike la lingvan stilon de la valanaj originaloj. Se ne satiro, ĉu ĝi sukcese imitas? Imito ĝi iagrade estas, sed kun malpli loga prozo, kaj kun multe pli da emfazo sur priskribo de la falusego k.s. ol atento pri la karaktero de la roluloj. Jano Karal, malgrava personaĵo en ĉi tiu libro, aparte malprofundas. Tio estas, kompreneble, konstanta karakterizo de pornografio, kaj la elektita pornografia formo do iom necesigas tian rezulton. Ni demandu ankaŭ, do, ĉu ĝi havas pornan valoron? Pornografiaĵo ĝi certe estas, kaj sufiĉe sprita se oni deziras (helpon por) fantazii pri tiaj temoj.

Adorantoj de la serio "Ĉu" sendube deziros pro scivolemo legi ĉi tiun bastardan valanidaĵon. Mi ĝin ĝuis precipe pro tio kaj pro la okazo divenadi kaj redivenadi, kiu finfine "devas" esti la vera verkisto. Sed la bonhumora, lingve senmakula, bele produktita verko estas kontribuo pli al la ĉiam kreskanta kuriozaĵa trezoro de nia lingvo ol al la literatura.

David K. Jordan (Usono)

Norma verko en nia sciencfikcia ĝenro

Misio sen alveno, de John Francis (1924-). Antverpeno/La Laguna: TK/Stafeto, 1982. 159p. 21cm. ISBN 90 6336 021 5. Prezo: 24,00 gld.

Francis havas larĝan gamon. En *Vitralo* (1960) kaj *La granda kaldrono* (1978) li provis diversajn gradojn de fantazieco kaj metodojn de verkado. Nun, fine, li povas verki sen ke la leganto rimarkus stebosignojn aŭ superfluajn privatajn ŝercojn. Lia relative pensema, profunda vizio restas kaj kunlaboras kun modesta sed (aŭ tial) efika verkarto; oni jam ne timas, ke li ripetos la nesukcesan artumon de la fino de *La granda kaldrono*. La pensa kosmo de Francis reprezentas la plej zorgajn kaj enpenetrajn elementojn de la okcidenta Esperantujo. Tiu kosmo multfacete aperas en tiu ĉi sciencfikcia verko. Kiel kutime, la sciencfikcia ĝenro ebligis al la aŭtoro prilumi erojn de la vefto de homeco, kiujn oni konas, sed kiuj ne aperas krom ĉe karambolo inter sufiĉe malsamaj civilizoj, unu el kiuj pli aŭ malpli perforte ŝanĝas la alian.

Francis evidente laboris por ellerni la sciencfikcian lingvon. Li sukcesis produkti verkon, kiu estas tiuĝenre norma, kaj kiu samtempe impresas bona romaneto kun subtilaj kaj interesaj protagonistoj. Mia sola plendo tiurilate estas, ke la admirindo de Halman iom kresĉendas proksime al la fino, sen sufiĉe da empiria starigo: oni invitas nin fidi al impresoj pri li ĉe aliaj, aŭ eĉ al impresoj pri impresoj; oni ne prezentas agojn de li, kiuj donus rekte al ni la deziratan impreson.

La prozo, kiel ĉiam ĉe Francis, legiĝas kutime flue kaj ĉiam bonkvalite el la ĝua vidpunkto. Sed min, grama-

tikulon, iom ĝenas la pluraj eraroj. Por ne makuli la recenzon, mi simple notos la paĝojn kaj liniojn (minusa linio estas linio de sube) de la klaraj misoj: 77/-10, 77/-8, 84/4, 85/-12, 89/-14, 96/-8, 101/14 (**por**), 106/2, 128/12, 128/-13, 129/9, 130/13 kaj 133/-12 (**antaŭ** anstataŭ **post**). Krome, **nun . . . nun** (84/-16) ŝajnas nenecesa apud la ekzistanta **jen . . . jen**, kaj **Mitsuo** (81/6 kaj aliloke) ŝajnas mistransskribo anstataŭ **Micuo** (la Esperanta silabado dividus **Mit-su-o** anstataŭ, ĝuste, **Mi-cu-o**). Sarki aŭ sarkigi erarojn estas respondeco ne nur de aŭtoro, sed ankaŭ de eldonisto kaj aliaj anoj de la kolektivo, kiu produktas libron.

Probal Daŝgupto (Hinda Unio)

Du makedonaj libroj

Makedona antologio. Elektis K. Solunski kaj M. Galeski. Diversaj tradukintoj. Prilep: E-Societo "La Progreso", 1981. 154p. 20cm. Prezo: 15,00 gld.

Jen alireblas literaturo el lingvo ĝis nun apenaŭ reprezentita en Esperanto.*

Aŭdante la vorton makedona vi eble pensas pri Aleksandro la Granda kaj la greka historio. Tamen, en la 6a jarcento, la origine greklingvaj makedonoj per slava almigro fariĝis anoj de la granda regiono de sudslavaj dialektoj. Ĉar tiujn popolojn dum multaj jarcentoj regis fremdaj monarĥoj, nur iom post iom la sudslavaj dialektoj havis okazon evolui al skribaj normlingvoj, okcidente de Makedonujo la serba, oriente la bulgara. Nur en la 19a jarcento, kiam malfortiĝis la Turka Imperio, ekvivis ankaŭ makedona verkado kaj formiĝis la makedona literatura lingvo. Hodiaŭ makedonoj vivas en Bulgarujo, Grekujo, Albanujo kaj ĉefe en la jugoslavia respubliko Makedonujo, kie ilia lingvo akiris leĝan oficialecon en 1944.

De tie venas ĉi tiu antologio. Ĝi enhavas 12 rakontojn kaj 36 poeziaĵojn de makedonaj aŭtoroj, kiuj (kun du esceptoj) verkis ĉi-jarcente. Ili travivis maltrankvilajn jardekojn en la centro de la bolanta kaj militanta Balkano. Tiu tempo, kiam disfalis la Aŭstrohungara kaj la Turka Imperioj, kiam furoris la du mondmilitoj, speguliĝas en iliaj rakontoj: figuras la turka sultano kaj ribelantoj kontraŭ li, la malamikeco inter turkoj kaj makedonoj, islamanoj kaj kristanoj. En la pli novaj rakontoj aperas la Dua Mondmilito, la rezistbatalantoj de vilaĝoj kaj montaro, hejmenvenantaj batalintoj kaj fuĝintoj post la milito. Por la poezia duono estas elektitaj mallongaj poemoj, kiuj traktas kaj aludas multfacetan temaron.

La tradukoj (faritaj de diversaj tradukintoj) estas ĝenerale fluaj kaj vivaj. La preso estas klara sed makulita de iom multaj preseraroj, el kiuj la aldonita pli ol dupaĝa korektendaĵaro listigas nur parton. Se la makedona literaturo estas por vi fremda, vi trovos komprenhelpojn en la antaŭparolo pri la evoluo de la makedona literaturo kaj en la biografia suplemento.

Por la makedona lingvo. Red. T. Dimitrovski , B. Koneski, T. Stamatoski. Trad. el la makedona N. Rašić. Zagreb: Internacia Kultura Servo, 1982. 91p. 20cm. Prezo: 6,00 gld.

La ekzistokaŭzo de Esperanto estas la urĝa neceso de lingva justeco, de kiu necedebla elemento estas la fundamenta rajto je la propra lingvo.

Ĉi tiu broŝuro pledas por la memstareco de la makedona, polemikante kontraŭ artikolo, kiu klasifas la dialektojn de Makedonujo kiel bulgarajn. Tiun kontraŭargumentadon komplementas pormakedonaj citaĵoj de sciencistoj kaj politikistoj kaj dokumentoj pri la uzado de la makedona en la rezistobatalo dum la Dua Mondmilito. Fine staras tri artikoloj el kiuj la plej informa traktas la formiĝon de makedona normlingvo kompare al la ceteraj slavaj.

Por ke libro estu internacie komprenebla, ne sufiĉas traduki ĝin al Esperanto. La Esperanta leganto, ne havante la atakatan artikolon, multon ne povas kompreni, des malpli prijuĝi. Ankaŭ pro la lingvistikaj kaj historiaj aludoj necesus esti balkanologo. Tiun impreson de senpripensa redaktado iom mildigas la postparolo, verkita por la Esperanta eldono. Ĝi donas tutslavan superrigardon kaj informas pri la antaŭaj tekstoj.

Lingve la traduko estas bone komprenebla. Tamen, ĝin iom pezigas ŝajninternaciaj vortoj anstataŭ la Esperantaj kaj la fakto, ke tradukinto kaj korektinto ne regas la uzon de **la** kaj **unu**. De IKS mi jam vidis pli bele presitajn librojn; speciale ĝenas malpuraj korektoj de preseraroj. Krome, en Jugoslavio oni devus kapabli presi cirilajn literojn legeble.

Komencu de la postparolo, kaj vi trovos, malgraŭ ĉio, interesajn informojn kaj opiniojn.

Klaus Schubert (FR Germanio)

Dek kvar israelaj kantoj

Israelo kantas. Prezentas Chantal, akompanas K. Ŝtern. Tel-Aviv: JELI, 1982. Kaseto stereofonia, 40-minuta. Kun tekstolibreto (16p. Ilus. 22cm). Prezo: 18,00 gld.

Estas facile konstati, ke pli kaj pli ofte gramofondiskoj kaj kasetoj pliriĉigas nian kutime tre tradicieman "libro"-merkaton. Tiun fenomenon ni ŝuldas grandparte al la junulara movado, kiel pruvas ankaŭ *Israelo kantas*, eldonita de Junulara Esperanto-Ligo Israela (JELI).

Se oni ne postulas, ke kaseto produktita de neprofesiuloj estu absolute perfekta, facile pardoneblas la amatoreco, kiu karakterizas ĉi tiun kolekton de "modernaj kaj malnovaj israelaj kantoj en Esperanto" (ne nur en Esperanto cetere). La tre bone komprenebla voĉo de la kantistino Chantal (kvankam ne tute sen artikulaciaj problemoj) certe forgesigas la kromsonojn, kiuj estiĝas dum la ludado de la muzikiloj kaj kelkfoje ek-

* Du aliaj libroj tradukitaj el la makedona aperis lastatempe: la romano *Ventoj* (7,50 gld) de B. Ivanov en 1976 kaj *Makedonaj popolaj rakontoj* (7,20 gld) en 1977.

ĝenas la ĝuon de tre belaj kanzonoj kiel ekz. "Dum vespero aŭ mateno". Pri la stereofonia karaktero de la surbendigo mi dubas.

Tradukante kanzonojn, oni devas zorge atenti, ke ili restu kanteblaj. Oni ne traduku trisilaban verson per du silaboj, kiel okazis en "Bonvenu paco"; same, ne eblas elturniĝi, ŝovante silabon de unu hemistiko (duonverso) al alia, kiel provis la tradukanto de "Hava Nagila"; kaj "Jerusalem' de or'" estus pli bela, se ĝi tekstus ". . . por ĉiu kanto via. . ." anstataŭ ". . . por ĉiu kant' via. . .". Ne tro fidu enklitikojn!

La tekstolibreto estas bedaŭrinde iom konfuza, tial ke ĝi enhavas strofojn netroveblajn sur la kaseto kaj la sinsekvo de la presitaj tekstoj dufoje ne kongruas kun tiu de la kantitaj.

Laŭ la klarigoj de la enkonduko al la tekstolibro, "ĝi arigas konatajn kaj ŝatatajn israelajn kantojn". Neisraelanon tial povas ŝoki la apero de kelkaj patriotaj kantoj sur la dua flanko. Oni ne povas priskribi militon per la lakona verso: "Ĝemegas la mortig-maŝinoj" kaj analizi ĝiajn kaŭzojn per la naiva konstato, ke "la sorto igas nin militi" (ambaŭ citaĵoj el "Kredu, venos bona tago"). Mi ne volas interpreti la kanton "Finĝan'", kiu laŭ mia tute persona impreso ŝajnas glori militan soldatservon.

Sume, rimarkindas, ke la kaseto estas – malgraŭ ĉiuj mankoj – bona provo prezenti al ni en nepretenda formo muzikan kulturon, kiu estas ankoraŭ tro malmulte konata kaj certe subtaksita.

Martin Haase (FR Germanio)

Unu el la "Infanlibroj de la Jaro"

La krabo kun oraj pinĉiloj; La aventuroj de Tinĉjo (1941), de Hergé (pseŭd. de Georges Rémi). El la franca trad. Hervé Gonin. Bruselo: Casterman, 1981. 62p. Kolorilus. 30cm. ISBN 2 203 01001 0. Bindita. Bildstria rakonto. Prezo: 13,20 gld.

Ĉi tiu eldono estas grava paŝo, kiu donas prestiĝon al la lingvo, ĉar libroj pri Tinĉjo ja eldoniĝis en kelkdeko da lingvoj. La libro atestas pri la ebleco uzi Esperanton por kia ajn literatura celo. Tio ŝajnas al ni evidenta, sed por eksterulo ĉia esperantaĵo, kiun li aŭ ŝi antaŭe vidis en nacilingva versio, kaptas pli da atento ol deko da nekonataj originaloj en Esperanto.

Tinĉjo, juna belga ĵurnalisto hazarde miksiĝas en strangajn okazaĵojn, kiuj igas lin kompreni ke temas pri kontrabandado. Kune kun kapitano Hadoko kaj la detektivoj Citserono kaj Tsicerono (bonega traduko!) li klopodas kapti la krimulojn. Certe oni povus kritiki iom malfajnan rilaton al la rasa demando en la rakonto. Mi tamen preferas ne fari tion, ĉar la originalo jam estas malnova, kaj kiam temas pri klasikaĵo oni ne kritiku malmodernaĵojn.

Tinĉjo estas grava klasikaĵo de la monda bildstria literaturo, ĉar temas pri la unua bildstria rakonto, kiu

atingis ĝeneralan popularecon, almenaŭ en la kategorio de longaj rakontoj. La desegnaĵoj estas lerte faritaj, kaj la rakonto mem atestas pri talentaj sprito kaj verkokapablo.

La traduko estas altkvalita. Eĉ interjekcioj estas ĝuste uzataj, kio estas malofta fenomeno. La traduko, tamen, ne ĉiam same sprite kiel *Asteriks* anstataŭigas naciaĵojn per esperantaj esprimoj. Por tiuj, kiuj jam konatiĝis kun ĉi tiu bela eldonaĵo, ne estis surprize, kiam oni en Antverpeno anoncis, ke ĝi dividis la premion de la Belartaj Konkursoj kiel "Infanlibro de la Jaro". Mi rekomendas la libron, pro ĝia klasikeco, altkvalita traduko kaj amuzeco.

Leif Gunnar Nordenstorm (Svedio)

NOTO: La alia gajninto de la premio "Infanlibro de la Jaro" estas la ĉina eldonaĵo *Pesi elefanton* (91p. 21cm. 7,50 gld), kiun ni recenzis en nia julia-aŭgusta numero.

Eterna temo, admirinda traduko

Boule de suif (1880), de Guy de Maupassant (1840-1893). El la franca trad. Fernando de Diego. Saarbrücken: Artur E. Iltis, 1982. 59p. 20cm. Prezo: 18,00 gld.

La maldankemo estas propraĵo de la homo, almenaŭ tiom kiom la parolo kaj la rido. Se la apokrifa libro de Judita asertas, ke post ŝia sinofero por forigi la danĝeron de sia urbo, ŝi vivis kun honoro ĝis sia 105a jaro, mi tion ne kredas, sed male, ke oni ŝin ŝtonumis, ĉar ŝi kuŝis kun idolano kaj malamiko, kaj ke poste kronikisto, hontante pri la faro de siaj samurbanoj, ornamis la epizodon. La homo ja povas ŝanĝi siajn vestojn,

sed la "infana raso" ankoraŭ tre malicas kaj la koro restas sama tra la jarmiloj.

En ĉi tiu rakonto de Maupassant ankaŭ okazas sinofero de virino. Kvankam prostituitino, ŝi posedas sian dignon homan kaj la bonaj burĝoj persvadas ŝin kuŝi kun la malamiko, kiun ŝi kore abomenas. Nu, poste venas la absoluta maldanko fare de la homoj, kiujn ŝi ĵus savis.

Ke la homa sinteno tiurilate ne ŝanĝiĝis, montras la tre moderna opero de Chico Buarque de Holanda *Ópera do Malandro*, en kies sceno "Geni' kaj la Zepelin'" (vidu lastatempan numeron de *Fonto*) li prezentas la saman temon. Tio pruvas, ke la historio de *Boule de suif*, cetere bazita sur reala okazintaĵo, estas eterna kaj do aktuala. La majstra rakontarto de la aŭtoro eĉ post pli ol cent jaroj neniom perdis el sia freŝeco, dank' al la simpla, senpretenda stilo.

Se pro tio la originalo estas ankoraŭ leginda, ĝi trovis ankaŭ sian majstrotradukinton en la Internacian Lingvon. Tion diras Gaston Waringhien en sia antaŭparolo: "La traduko de F. de Diego admirinde redonas la valorajojn de la originalo." *Magister dixit**, do nenio pli aldonenda sen la risko, ke oni suspektos la recenzanton aparteni al literatura kliko, kies anoj reciproke "sin surĵetas per buntaj konfetoj".

L.H. Knoedt (Brazilo)

---

* Latina sentenco signifanta: La majstro diris . . .

Vigla legaĵo por komencantoj

La sentimulo, de J.F. Cooper. Reverkis Roger Imbert. Zagreb: Internacia Kultura Servo, 1982. 69p. 20cm. Facila Esperanto 1. Prezo: 9,00 gld.

Ĉi tiu libro aĝas 150 jarojn kaj tamen estas tute nova. Internacia Kultura Servo inaŭguras per ĝi libroserion en facila Esperanto.

La sentimulo estas romano en historia medio de la fama usonano Cooper. Imbert rerakontas ĝin uzante nur 450 bazajn radikojn. Malgraŭ tiu mallarĝa vortprovizo la lingvo fluas glate kaj vigle, ne sonas perforte faciligita. Fakte ĉi tia lingvaĵo estas tre eduka: ĝi montras kiel vaste uzeblas afiksa derivado, sen ke la lingvaĵo ŝajnu konstruita aŭ peza. Imbert sukcesis redoni la ekscitan enhavon, la intrigojn, konspirojn kaj murdojn en la historia Venecio, per facila, sed neniel teda lingvo. Sepdekon da radikoj kaj afiksoj ekster la baza provizo li tamen devis uzi. Ili aperas fine de la libro kun serbokroata, germana kaj hungara tradukoj. Facilus por landaj libroservoj aldoni sialingvan liston.

La libreto estas pli bela kaj pli zorge farita ol pli fruaj zagrebaĵoj. Mi deziras al IKS tiel multe da aĉetantoj, ke ĝi post ĉi tiu bonkvalita ekpaŝo povu realigi sian planon eldoni duan volumon en 1983.

Klaus Schubert (FR Germanio)

Laste aperis . . .

Al la junuloj kaj **Biografio** (1938), Petro Kropotkin kaj M. Orseti. Trad. el la rusa kaj pola. Laroque Timbaut: Cercle Espérantiste, 1982 (represo). 54p. 15cm. Prezo: 3,90 gld.

Amled (ĉ. 1200), Saxo. El la dana trad. M.R. Andersen. Kopenhago: Eldonejo Perspektivo, 1981. 8+12p. Ilus. Mimeo. 21cm. Malnova dana legendo pri Hamleto. Prezo: 5,40 gld.

111 fabloj, I. A. Krilov (1769-1884). El la hungara trad. Sergej Rublov (1901-1979). Budapest: Hungara Esperanto-Asocio, 1979. 133p. Ilus. 18cm. ISBN 963 571 043 7. Malpli ampleksa versio de la libro *Elektitaj fabloj*, aperinta ĉe TK/Stafeto samjare. Prezo: 12,00 guldenoj.

Current work in the linguistics of Esperanto, R.E. Wood. Rotterdam: UEA, 1982. 47p. 21cm. ED 28A. Prezo: 3,00 gld.

Ĉu ni kunvenis vane?, Johán Valano (pseŭd., 1931 -). Antverpeno/La Laguna: TK/Stafeto, 1982. 180p. 21cm. ISBN 90 6336 023 1. Spionromano originale verkita en Esperanto. Prezo: 25,80 guldenoj.

Ĉu socialismo konstruiĝas en Sovetio?, E. Lanti kaj M. Ivon. Laroque Timbaut: Cercle Espérantiste de l'Agenais, 1982. 52p. Mimeo. 21cm. Prezo: 3,00 guldenoj.

Ĉu ŝi mortu tra-fike?; Priseksa kaj prikrima fantaziaĵo, Johán Balano (pseŭd., 1931 -). Antverpeno/La Laguna: TK/Stafeto, 1982. 92p. 21cm. ISBN 90 6336 027 4. Originale verkita en belstila kaj malpruda lingvaĵo. Prezo: 18,60 gld.

Dimitrov: **Georgo Dimitrov; Konciza Biografio**, Petra Radenkova. El la bulgara trad. Nikola Aleksiev. Sofia: Sofia-Press, 1982. 68p. Ilustrita. 20cm. Prezo: 6,00 gld.

Elementa kurso de Esperanto. Aŭtoro neindikita. Tokio: Japana Esperanto-Instituto, 1980. 45p. Ilus. 26cm. Simpla konversacia kurso en 20 lecionoj. Prezo: 12,00 gld.

El la revuo orienta (1920-1936); Volumo 1. Elektis N. Syozi kaj Y. Sato. Tokio: Japana Esperanto-Instituto, 1976. 260p. Ilus. 21cm. Elekto de artikoloj (Esperantaj kaj japanlingvaj) diverstemaj (movadaj, socipolitikaj, beletraj, fakaj, lingvaj). Prezo: 17,40 guldenoj.

El la revuo orienta (1937-1960); Volumo 2. Elektis N. Syozi kaj Y. Sato. Tokio: Japana Esperanto-Instituto, 1978. 304p. Ilus. 21cm. Elekto de artikoloj (vidu ĉe Volumo 1, sub la sama titolo). Prezo: 24,90 guldenoj.

En serĉo de la feliĉo, A. López Luna. Buenos Aires: Amigos de López Luna, 1982. 102p. Mimeo. 17cm. Filozofiaj notoj pri la ĉiutaga temaro. Prezo: 6,90 gld.

Esperanta medicina terminaro (1979), Josef Hradil. Praha: Ĉeña Esperanto-Asocio, 1982 (represo). 63p. 21cm. La terminaro aperis felietone en *Medicina internacia revuo*. Prezo: 7,80 gld.

Esperanto and literary translation, H. Tonkin kaj T. Hoeksema. Rotterdam: UEA, 1982. 36p. 21cm. ED 29A. Intervjuo kun H. Tonkin. Prezo: 3,00 gld.

Espéranto dans l'enseignement; L', Pol Denoël. Wilrijk: Sonorilo, 1982 (2a eld). 30p. 23cm. Informbroŝuro pri Esperanto kaj ĝia instruado. Prezo: 6,00 gld.

Esperanto: European or Asiatic Language? Claude Piron (1931-). Rotterdam: UEA, 1981. 31p. 21cm. ISSN 0165-2575. Esperanto Documents 22A. Prezo: 3,00 gld.

Esperanto in Theorie und Praxis. Div. aŭtoroj. Augsburg: Deutsches Esperanto-Institut, 1982. 44p. Mimeo. 21cm. Sep seminariaj prelegoj, plejparte germanlingvaj kun resumoj en Esperanto. Prezo: 3,00 gld.

"JEN NIA MONDO"; Duo Espera kantas el Dylan kaj Seeger: La Libroservo de UEA akiris kvanton de tiu delonge elĉerpita kaseto. Prezo: 21,00 gld., plus afranko. Kantotekstoj aldonitaj. Triona rabato ekde 3 ekz.

Esperanto, kion mi povas fari per tio? Antverpeno: Flandra Esperanto-Ligo, 1982. 20p. Ilustrita. 21cm. Skizoj pri la historio, Movado kaj praktikaj eblecoj de Esperanto. Prezo: 3,60 gld.

Espéranto la langue internationale qui unit l'humanité. . . Red. T. Mercier. Sherbrooke: Association Canadienne d'Espéranto, 1981. 19p. Ilus. 25cm. Informilo. Prezo: 1,20 gld.

Esperanto pro 3. třídy základních škol kaj **Pracovní listy**, Ladislav Prachař. Praha: Český esperantský svaz, 1981. 123+106p. Ilus. Mimeo. 20cm. Prezo (2 volumoj): 6,00 gld.

Estante kvakero en Japanujo, Tayeko Yamanouchi. El la angla trad. Kris Long. Morecombe: Kvakera Esperantista Societo, 1982. 8p. 16cm. Prezo: 2,10 gld.

Facilaj dialogoj, Albert Lienhardt. Mulhouse: Ligue Française "Pro UNESCO", 1982. 56p. Mimeo. 14cm. Dulingva eldono en Esperanto kaj franca. Prezo: 9,60 gld.

Fenestro kristala; Noveloj kaj Poemoj, Julia Pióro (1902-). Ascoli Piceno: Gabrielli, 1981. 197p. 21cm. Plejado: Beletra eldonserio 15. Dudek rakontoj diverstemaj, kiujn akompanas simplaj, senpretendaj poemetoj. Prezo: 28,80 gld.

Fontoj de Esperanto, La (1956), Douglas B. Gregor (1909-). Glasgow: Kardo, 1982 (2a kompletigita eldono). 32p. 21cm. ISBN 0 905149 18 1. Prezo: 8,40 gld.

Fox: **George Fox; Fondinto de la religia societo de amikoj** (1948), Henry van Etten (1893-1968). Morecambe: Kvakera Esperantista Societo, 1982. 23p. 18cm. Prezo: 2,70 gld.

Funktion und Kultur des Esperanto, Werner Bormann (1931-). Deutscher Esperanto-Bund, 1982. 32p. 21cm. Prezo: 3,00 gld.

Insulo de voĉoj, La / La diableto en la botelo, R.L. Stevenson (1850-1894). El la angla trad. Cynthia C. Vincent. Glasgow: Eldonejo Kardo, 1982. 66p. Ilus. 21cm. ISBN 0 905149 19 X. Du aventuraj rakontoj, el kiuj la dua jam pli frue aperis en Esperanto. Prezo: 14,70 guldenoj.

Kolekto de la referaĵoj el la Internacia seminario pri apliko de Esperanto en scienco kaj teĥniko 1982; 1. Energio – la tutmonda problemo 2. Problemoj de la fakaj lingvoj kaj traduko, pluraj aŭtoroj. Redaktis V. Novobilský kaj Z. Pluhař. Praha: Scienc-teĥnika Sekcio de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, 1982. 94p. Mimeo. 21cm. Prezo: 9,60 guldenoj.

Komunlingvaj nomoj de plantoj de nord-okcidenta Eŭropo, Provizora privata listo de, Wouter F. Pilger. Lelystad: Vulpo, 1982. 72p. 21cm. ISBN 90 70074 31 1. Latinaj kaj Esperantaj nomoj de 2000 plantoj. Kun indekso. Prezo: 12,00 gld.

Komunlingvaj nomoj de plantoj de nord-okcidenta Eŭropo, Provizora privata listo de; Indekso, W.F. Pilger. Lelystad: Vulpo, 1982. 8p. 21cm. ISBN 90 70074 32 X. Prezo: 2,10 gld.

Kranio kantas; Folkloro en Okinavo, Genkai Nakaima. El la japana trad. "Ovoj en kovejo". Eukuoka: Esperanto-Societo, 1981. 62p. Ilus. 21cm. Prezo: 6,00 gld.

Matematikaj kaj statistikaj terminoj en Esperanto; Suplemento al "Plena ilustrita vortaro", Olav Reiersøl (1908 -). Oslo: Instituto pri Matematiko de la Universitato de Oslo, 1982. 33p. 30cm. Mimeo. ISBN 82 553 0482 7. Prezo: 6,00 gld.

Naŭa kanalo, La, István Nemere. Budapest: Hungara Esperanto-Asocio, 1982. 104p. 21cm. ISBN 963 571 037 2. Tridek skizoj, rakontoj kaj noveloj, iuj sciencfikciaj. Prezo: 13,80 guldenoj.

LA SOLA IRLANDA VERKO EN ESPERANTO
Brian Merriman / Albert Goodheir
LA NOKTMEZA KORTUMO
ĉefverko el la gaela literaturo
Vulpo-Libroj. 36p. Prezo: 4,80 gld. Mendu ĉe UEA

KIEL NOMI TIUN FLORON?
Provizora privata listo de komunlingvaj nomoj de plantoj de nord-okcidenta Eŭropo
— "komunlingva nomo" preciza: por pli ol 2000 sovaĝaj florplantoj;
— "popola nomo": por tre multaj el ili.
Vulpo-Libroj. 72p. Prezo: 12 gld. Mendu ĉe UEA.

Peano: Life and Works of Giuseppe Peano (1858-1932), Hubert C. Kennedy. Dordrecht/Boston/London: D. Reidel Publishing Company, 1980. 230p. 23cm. ISBN 90 277 1068 6 pbk. Studies in the History of Modern Science; Vol. 4. Studo pri la vivo kaj verkoj de la fama itala matematikisto kaj interlingvisto. Pluraj ĉapitroj pri liaj interlingvistikaj verkaro kaj agado. Prezo: 42,90 guldenoj.

Por multoble plivastigi nian movadon ni ĉiam uzu nur Esperanton tre facile kompreneblan! Albert Lienhardt. Mulhouse: Ligue Française "Pro UNESCO", 1982. 64p. Mimeo. 21cm. Lingvaj kaj didaktikaj artikoloj. Prezo: 7,50 gld.

Praktika poŝkalendaro de "Monato"; La jaro 1983. Red. Stefan Maul. Brasschaat: TK/Stafeto, 1982 (ne indikite). 160p. Ilus. 15cm. Krom la kalendaro por notoj enestas multaj utilaj kaj kuriozaj informoj, pluraj mapoj, listoj, tabeloj kaj 4-lingva vortareto (Esperanta, angla, irlanda, korea). Prezo: 9,60 gld.

Tiel okazis aŭ Mistero minora (1958), Ferenc Szilágyi (1895-1967). Saarbrücken: Artur E. Iltis, 1982 (represo). 120p. 20cm. Mallonga krimromano, lingve elstara. Prezo: 21,00 gld.

Vespera gruo, Zyunzi Kinosita. El la japana trad. Masao Miyamoto. Osaka: Japana Esperanta Librokooperativo, 1982. 73p. Ilus. 19cm. Teatraĵo por kvar roluloj; pri malmoraleco de la mono. Prezo: 13,80 guldenoj.

Vort-teorio en Esperanto, La (1914), René de Saussure (1872-1943). Saarbrücken: Artur E. Iltis, 1982 (represo de la eldono Genève 1914). 90p. 17cm. La unua scienca analizo de Esperanto. Prezo: 13,80 guldenoj.

MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bonvolu atenti, ke al ĉiuj netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Nederlando aldoniĝas 4, kaj al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 18 procentoj por la enlanda imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas sendokostoj: por la mendoj sub la valoro de 200 guldenoj – 20 procentoj, por la mendoj super 200 guldenoj – 10 procentoj. Minimumaj sendokostoj estas 5,00 gld. Antaŭdankon pro via mendo!



LA ALTERNATIVO

internacia magazino sendependa
pri politiko, ekonomio kaj kulturo

40 paĝoj, riĉe ilustrita
Petu provekzempleron ĉe:
TK/STAFETO, Miksebaan 65A,
B-2130 Brasschaat, Belgio
kontraŭ du internaciaj respondkuponoj.

TEJO-paĝo

Ĉi tiun rubrikon prizorgas: PAUL S. HOPKINS, 45 Mansion Street, Kitchener, Ontario, Kanado N2H 2J5.

NOVA PERIODAĴO DE TEJO:

TEJO tutmonde en 1983

DUM LA LASTAJ JAROJ la strebo de TEJO agadi tutmonde (kaj ne nur eŭrope) intensiĝis tiel organize kiel serve. Organize tio speguliĝas, ekzemple, en la fakto ke el la nunaj ok estraranoj (vidu la liston ĉi-paĝe) tri estas ekstereŭropanoj. Serve tio speguliĝas en la plivastiĝo de la Pasporta Servo kaj en la nova karaktero de la periodaĵoj de TEJO. Tio ekis per la decido antaŭ tri jaroj sendi *Koncize* (ĝis tiam revuo kun distribuo nur interne de iuj okcidenteŭropaj landaj sekcioj de TEJO) al ĉiuj individuaj membroj, patronoj, landaj sekcioj kaj kontaktadresoj de TEJO. Tiun decidon akompanis adekvata ampleksigo de la spaco por la materialoj de TEJO en tiu revuo. Antaŭ unu kaj duona jaroj *Koncize* ekhavis la rubrikon "Orienta paĝo" por prezenti ekstereŭropan, azian materialon.

Sed tiu ekstereŭropa materialo minacis la eŭropan karakteron de *Koncize*, kies legantaro konsistas 95-procente el eŭropanoj. Pro tio la Komitato de TEJO decidis minimumigi sian partoprenon en *Koncize* kaj dissendadi ĝin porinforme nur al la landaj sekcioj kaj ĉefaj kontaktadresoj. Samtempe oni decidis krei novan periodaĵon por la internacia junulara Esperanto-movado. Tio estas *TEJO tutmonde*, gazeto dumonata, proksimume en la amplekso kaj formato de la nuna *Koncize*, distribuota al ĉiuj individuaj membroj, patronoj, landaj sekcioj kaj kontaktadresoj de TEJO. Ĝia provnumero (sub la redakto de T. Bormann) aperis jam en aprilo 1982. Sed la vera unua numero aperos en januaro 1983 sub la redakto de la subskribinto.

Iuj el la ĉefaj enhavaj eroj de la nova periodaĵo estos: raportoj pri la agado de la labororganoj de TEJO, informoj pri la junulara E-agado tra la mondo, kalendaro de okazontaj junularaj renkontiĝoj, artikoloj pri la agado kaj politiko de TEJO. Ĉiu ajn estas bonvena kontribui! Artikoloj, prefere koncizaj, estas atendataj ĉe la redaktoro Paŭlo S. Hopkins (adreso ĉi-supre).

Paul S. Hopkins

PRI LA VENONTJARA TEJO-KONGRESO: Post iom da neantaŭviditaj problemoj pri la loko de la 39a Internacia Junulara Kongreso de TEJO en 1983, nun ŝajnas, ke oni trovas kontentigajn solvojn. Baldaŭ disponeblos la aliĝiloj, kiujn oni dissendos kun unu el la TEJO-eldonaĵoj, sed vi povas ilin peti ankaŭ de la Centra Oficejo en Roterdamo, kaj oni plenumos vian peton tuj kiam la aliĝiloj aperos. Ne malhavu IJKon en 1983!

"TEJO tutmonde" (vidu la apudan tekston) estos konvena forumo ankaŭ por la azia movada junularo. Ĉi-supre estas plia foto el la komuna seminario de la japanaj kaj koreaj gejunuloj, pri kiu ni amplekse raportis en la oktobra n-ro.

Nuna Estraro de TEJO

DUM LA 38a Internacia Junulara Kongreso de TEJO, en aŭgusto ĉi-jare en Loveno (Belgio), okazis pluraj ŝanĝoj en la Estraro de TEJO, tiel ke ŝajnas esti utile aperigi ĉi tie la kompletan liston, kun la nova disdivido de la taskoj:

Prezidanto: Amri Wandel, 30-A Nordau-str., IL-75 263 Riŝon-Lecijon, Israelo **(varbado)**
Unua Vicprezidanto: Ian Jackson, p/a Esperanto-Centro, 140 Holland Park Ave., London, Britio W11 4UF **(financoj, eldonaĵoj, servoj)**
Dua Vicprezidanto: András Lukács, ĉe HEJ, Pf. 193, H-1368 Budapest, Hungario **(scienca kaj faka agado)**
Ĝenerala Sekretario: Ian Tarrant, 28 Sakins Croft, Harlow, Essex, Britio CM18 7BW
Estrarano: Yves Bellefeuille, 2372 Haddington, Ottawa, Ontario, Kanado K1H 8J4 **(kongresoj)**
Estrarano: Martin Haase, Weidenpescher Str. 16, D-5000 Köln 60, FR Germanio **(eksteraj rilatoj)**
Estrarano: Paul Hopkins, 45 Mansion Street, Kitchener, Ontario, Kanado N2H 2J5 **(landa agado)**
Estrarano: Michael Lennartz, Theaterstr. 10, DDR-1720 Ludwigsfelde, Germana DR **(edukado de gvidantoj)**

TEJO dankas pro ilia plurjara laboro al Csaba Lendvay kaj Thomas Bormann, kiuj demisiis el la Estraro pro aliaj okupoj.

Aktivuloj de TEJO bonvolu atenti, ke la Komisiono pri Eksteraj Rilatoj (KER) nuntempe ne disponas pri volontulo en la Centra Oficejo. Oni do skribu pri tiaj demandoj al la koncerna estrarano (M. Haase).

Nekrologoj

STEFAN MINKOV (1883-1982), dojeno de Veterana Esperantista Klubo, mortis en Sofio (Bulgario) la 2an de julio. Minkov eklernis Esperanton en 1901 kaj gvidis kursojn ne nur en Bulgario sed ankaŭ en Francio, kie li vivis dum kelkaj jaroj (1904-09). Li membris en UEA pli ol 60 jarojn kaj estis longtempe delegito en Sofio. Li antaŭe plenumis la funkciojn de sekretario kaj vicprezidanto de Bulgara Esperantista Asocio, kaj dum la Unua Mondmilito estis kunredaktoro de *Bulgara Esperantisto*.

JAMES T. ALLAN (1915-1982) mortis en Wellington (Nov-Zelando la 6an de julio. Allan estis multjara komitatano de UEA, en kiu li mem bris ekde 1937. Li servis kiel ĉefdelegito dum 24 jaroj (ekde 1958) kaj estis inter la plej konataj kaj meritplenaj nov-zelandaj esperantistoj. Dum multaj jardekoj li animis la agadon de Nov-Zelanda Esperanto-Asocio, kies ĝenerala| sekretario (1953-55), kasisto (1955-57) kaj prezidanto (de post 1970) li estis.

MARIA KING (1938-1982) forpasis la 25an de septembro en Londono. Ŝi lernis Esperanton en Torino (ŝia fraŭlina nomo estis Frus) kaj dum kelkaj jaroj laboris tie en la oficejo de Itala Esperanto-Federacio. En marto 1972 ŝi posteniĝis ĉe UEA en Roterdamo kaj laboris kiel teknika kunlaboranto de nia revuo ĝis januaro 1975. En 1976 ŝi edziniĝis al la antaŭa libroserva oficisto de UEA Geoffrey King, kun kiu ŝi havis du filinojn, denaske parolantajn Esperanton. S-ino King estis dumviva membro de UEA.

PETER HERMANNS (1901-1981), fakdelegito pri fervojoj en Wallenhorst (FR Germanio), forpasis la 15an de julio 1981.

W. CAMPBELL NELSON (1908-1982), multjara esperantisto, fakdelegito de UEA, kiu servis en la loka grupo (Los Angeles, Usono) i.a. kiel prezidanto, forpasis la 30an de junio.

WALTER BEHRMANN (1897-1982) forpasis la 20an de septembro en Hamburgo (FR Germanio). Li lernis Esperanton en 1921 kaj ekinstruis ĝin en 1926. Li aktivis ĉefe en SAT kaj la loka societo, kies honora membro li estis.

MARIA LAADE (1901-1982), kiu lernis Esperanton en sia junaĝo kaj multe aktivis en la loka E-movado, forpasis la 12an de oktobro en Berlino. S-ino Laade estis malavara mecenato de UEA al kiu ŝi multfoje donacis grandajn monsumojn.

VINOBA BHAVE (1895-1982), hinda religia gvidanto, socia reformisto kaj la plej konata disĉiplo de Mahatma Gandhi, forpasis antaŭ nelonge en Hinda Unio. Bhave konatiĝis kun Esperanto komence de 1960 (pere de T. Sekelj) kaj estis forta apoganto de la Internacia Lingvo.

OSKAR EKLUND (1901-1982), fakdelegito de UEA en Helsingborg (Svedio), forpasis la 14an de septembro.

SIMEON N. PODKAMINER (1901-1982), honora membro de UEA kaj vicprezidanto de Asocio de Sovetiaj Esperantistoj, forpasis la 28an de septembro en Leningrado. Li lernis Esperanton en 1920 kaj jam en 1921 estis inter la organizantoj de la 1-a Sovetunia E-Kongreso. En 1926 li estis sekretario de la 6a Kongreso de SAT en Leningrado. Poste, ĝis la malapero de Sovetrespublikara Esperantista Unuiĝo en 1937, Podkaminer estis prezidanto de ĝia junulara sekcio kaj membro de la Centra Komitato de SEU. Li havas multajn meritojn pri la revivigo de la Movado en Soveta Unio post la Dua Mondmilito. Unu el liaj lastaj kontribuoj al la Esperanto-movado estas la fondiĝo de Leningrada Esperanto-Teatro, kiun li inspiris kaj animis.

CLAUDE TRESORIER (1906-1982), fakdelegito kaj membro de UEA de post 1947, forpasis la 8an de septembro en Göttingen (FR Germanio).

LUDOMIRA KIELPIŃSKA (1905-1982), multjara UEA-delegito en Bydgoszcz, honora membro de Pola Esperanto-Asocio kaj aktivulino en la loka Esperanto-movado dum pli ol 60 jaroj, mortis la 15an de majo.

Loke

Nederlando

• Preskaŭ 400 partoprenantojn nombras nun la nova koresponda kurso de FLE, laborista Esperanto-organizaĵo por la nederlandlingva teritorio. Oni lernas laŭ nova kursomaterialo verkita de Bert de Wit (*Praktika kurso de Esperanto*). Multaj gekursanoj eluzas la eblecon partopreni regulajn semajnfinajn studrondojn, kie oni praktikas la lingvon kaj ricevas respondojn al siaj demandoj. Oni ne memoras, ke dum la lasta jardeko iu alia provo interesi nederlandlingvanojn pri Esperanto rikoltis tiel multe da sukceso.

Soveta Unio

• Du famaj estonaj esperantistinoj almenaŭ simbole kuŝas en la sama tombo. La steleo (vidu la foton) sur la tombo de Hilda Dresen (1896-1981) nun portas ankaŭ la nomon de ŝia pli aĝa fratino Helmi Dresen (1892-1941), kiun murdis nazioj kaj kies ekzekutoloko ne estas konata.

• En la laste aperinta, ĉefe ruslingva verko *Interlinguistica Tartuensis,* eldonita de la Universitato en Tartu (Estonio), ĉiujn kontribuaĵojn akompanas Esperanta resumo. La libro, kiun redaktis prof. A. Dulichenko, estas omaĝo al la 75a datreveno de la fama estona sciencisto Paul Ariste, kiu mem estas malnova esperantisto.

Ĉinio

• En septembro ĉi-jare, Ĉina Esperanto-Ligo funkciigis la duan Esperanto-kurson por altlernejaj fremdlingvaj instruistoj, kun la aprobo de la Eduka Ministerio. Venis 16 kursanoj el 16 superaj lernejoj. La unua kurso finiĝis en julio 1982. La kursanoj diplomiĝis kun bonaj poentoj kaj multaj el ili instruas Esperanton en diversaj provincaj urboj kaj aktivas en lokaj E-kluboj.

Danlando

• De la 18a ĝis la 20a de marto 1983 en Kopenhago okazos komuna dana E-kongreso por festi 75-jaran jubileon de Esperanto en Danlando. Dum la Kongreso, kiu havos festan karakteron kaj kiu bonvenigas ankaŭ eksterlandajn gastojn, okazos la jarkunvenoj de Dana Esperanto-Asocio, Dana Laborista Esperanto-Asocio kaj Dana Esperantista Fervojista Asocio. Kontaktadreso: Komunkomitato de Kopenhagaj Esperantistoj, p/a s-ino Bodil Kühlmann, Løvetandsvej 31, DK-2700 Brønshøj, Danlando.

Ĉeĥoslovakio

• 250 ĉeestantoj (kun gastoj el 6 landoj) partoprenis la 23an de oktobro la feston okaze de la 80-jara jubileo de la Esperantista Klubo en Prago. La programo daŭris de la 10a matene ĝis la 11a horo vespere kaj inkluzivis prelegojn, koncerton, artan programon kaj balon. La 24an de oktobro oni metis florojn sur la tombon de Stanislav Kostka Neumann (1875-1947), fama ĉeĥa poeto kaj kunfondinto de la Klubo.

Nord-Ameriko

• Laŭ la kvaronjara *Bulteno* de Amerika Asocio de Instruistoj de Esperanto (numero de sept. 1982), en Usono kaj Kanado ĉi-jare okazas pli ol 50 Esperanto-kursoj kun ĉ. 700 studantoj de la Internacia Lingvo. En la sama, cetere tre enhavoriĉa periodaĵo, ni legis la informon, ke la koresponda kurso de Kanada Esperanto-Asocio havis ĉ. 930 partoprenantojn inter septembro 1981 kaj junio 1982. Pere de alia poŝta kurso, en Usono, pluraj centoj lernas la lingvon (Bostono 66, Sun City en Arizono 27, Los Angeles pli ol 100). Diversgradajn korespondajn kursojn de la usona landa Asocio ELNA partoprenas 118 gekursanoj.

Fake

• Turismo: En la polaj urboj Toruń, Bydgoszcz kaj Varsovio, de la 15a ĝis la 24a de oktobro 1982, okazis la 8a Internacia Foiro de Esperanto-Turismo. Tie oni kontraktis pri interŝanĝo de E-grupoj de turistoj en 1983 inter: Belgio, Britio, Bulgario, Ĉeĥoslovakio, Finnlando, Hungario, Italio, Jugoslavio, Pollando, Svedio kaj Turkio. Partoprenis ankaŭ pluraj reprezentantoj de ekstermovadaj turismaj agentejoj. Sur la foto: partoprenantoj dum ekskurso al Funka.

Disleksio

• La franca esperantisto André Bertin antaŭ nelonge doktoriĝis en Parizo per la tezo "Une méthode de dépistage de la dyslexie" (Metodo por spuri la disleksiulojn). Kvankam la tezo ĉefe traktas la disleksion (t.e. perturbon en la legado kaj ortografio) rilate al la franca lingvo, ĝi komparas samspecajn malfacilaĵojn ankaŭ rilate la germanan kaj hispanan lingvojn. Kiel d-ro Bertin mem notas en la antaŭparolo, li "estus penege kolektinta la informojn" sen helpo de deko da esperantistoj en FR Germanio, Germana DR, Aŭstrio kaj Hispanio.

Radio

• Al la demando de aŭskultanto: "Kial vi ne elsendas kurson de la Internacia Lingvo Esperanto?", la prezentantino de la programo "Leterkesto" en la Monda Servo de la Brita Radio (BBC World Service) respondis jene: "Nuntempe ne ekzistas planoj pri kurso de Esperanto. Sed se Esperanto iĝos la komuna lingvo de la mondo, certe ankaŭ ĉi tiu programo okazos en Esperanto. Tiam ĝia nomo estos 'Poŝtkesto'. Tiu nomo plaĉas al mi; ĉu ne al vi?" La elsendo okazis kvinfoje la 1-an kaj la 2an de oktobro. La programojn de la Monda Servo aŭskultas ĉ. 100 milionoj da homoj tutmonde.

Futbalo

• En Porto Alegre (Brazilo) komencis aperi kvaronjara bulteno *Verda tapiŝo*, kiun eldonas Internacia Esperanto-Klubo pri Futbalo. La nova periodaĵo "celas kunligi la futbalsimpatiantojn per Esperanto". La unua numero, ĵus aperinta, estas varia enhave, sed lingve iom subnivela. Redaktas: Flavio A.O. Gomes (Caixa Postal 4062, BR-90000 Porto Alegre – RS, Brazilo).

Periodaĵoj

• Wouter F. Pilger, konata kiel eldonisto (Vulpo-Libroj) kaj poeto, iniciatis kontaktojn inter ĉiutagaj parolantoj de Esperanto. Ĵus aperis *Forumo de ĉiutagaj parolantoj* (neregule aperanta bulteno por kaj de homoj kiuj ĉiutage parolas la Internacian Lingvon Esperanto). La 8-paĝa bulteneto provas klarigi la celon de la iniciato kaj jam starigas kelkajn interesajn lingvajn demandojn pri ĉiutagaĵoj. Se vi apartenas al la ĉiutagaj parolantoj de la lingvo, petu enketilon ĉe: W.F. Pilger, Leekerhoek 26, NL-8223 ZS Lelystad, Nederlando.

• *Etnismo*, informilo pri etnaj problemoj, atingis en oktobro ĉi-jare sian 30an numeron. Tio signifas, ke la 20-paĝa bulteno aperas jam plenan jardekon (3 numeroj jare kontraŭ abonprezo de 11,20 gld). En la

30a numero de *Etnismo* trovigâs, interalie, tekstoj pri etnaj problemoj en Svislando, Nikaragvo, Nederlando kaj Hispanio. La bultenon redaktas kaj eldonas Uwe Joachim Moritz (FR Germanio).

Tradukoj

• *Aventuroj de pioniro* (1962), aŭtobiografia artikolaro de Edmond Privat, aperos baldaŭ en la itala traduko de Dante Bertolini el Locarno (Svislando). Bertolini en 1979 tradukis antologieton de la Esperanta poezio, *Dal nuovo giardino/El la nova ĝardeno*, kiu aperis ĉe la Eldonejo Pedrazzini en Locarno.

• Marc Delforge (1907-) el Charleroi en Belgio tradukis en la francan lingvon la ĉefverkon de Sándor Szathmári (1897-1974), *Vojaĝo al Kazohinio* (1958). S-ro Delforge ankoraŭ ne sukcesis trovi eldoniston por sia traduko, kies kopion li sendis al la Biblioteko Hodler de UEA.

• Antaŭ nelonge aperis indonezia traduko de la verko *Ekrigardo al budhismo* de R.L. Soni. Estas interese, ke la indonezia traduko de Liem Tjong Hie ne estiĝis surbaze de la anglalingva originalo de tiu verko sed laŭ la Esperanta traduko de Bhikkhu Anuruddha.

Personoj

Jung

• La 21an de decembro ĉi-jare, Teo Jung, honora membro de UEA kaj fondinto de *Heroldo de Esperanto*, festos sian 90an datrevenon. Malgraŭ tiu respektinde alta aĝo, Jung ankoraŭ estas vicdelegito de UEA en Scheveningen (Nederlando). Kvankam li kiel honora membro ne plu devis pagadi la kotizon al UEA, Jung tion regule faradis tra la jaroj. Li pasintjare pagis eĉ la kotizon de dumviva membro. Simile li agis pri la ĉi-jara kongreso en Antverpeno, al kiu li simbole aliĝis kaj donacis kelkcenton da guldenoj por diversaj bonfaraj kongresaj fondaĵoj. Antaŭ deko da jaroj Jung donacis multajn librojn kaj periodaĵojn al la Biblioteko kaj Libroservo de UEA.

Wood

• D-ro Richard E. Wood, redaktoro de la revuo *Lingvaj problemoj kaj lingvo-planado (LPLP)*, transloĝiĝis el Usono al Saŭda Arabio. Lia nova adreso estas: English Department, College of Education, King Saud University, Abha, Saŭda Arabio. D-ro Wood restas redaktoro de *LPLP*, kiu eldoniĝas akurate (ĵus aperis la n-ro 3 de la volumo 6, la lasta por 1982). La revuo, kiun publikigas la Eldonejo de la Universitato de Teksaso (Usono), kunlabore kun CED, aperas nacilingve (ĉefe en la angla) kun Esperantaj resumoj. Ĝi estas abonebla ĉe UEA (trinumera volumo kostas por individuaj abonantoj 40,00, kaj por institucioj 64,00 guldenojn).

Oficiala Informilo

N-ro 557

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Korea Respubliko: Han Moo-hyup. Nederlando: C.P.J. de Boer. Usono: Alex Tate.

DONACOJ 1982 (Gld.) ĝis la 12a de novembro

FONDAĴO AZIO-AFRIKO: FR Germanio: H. Schindler 14,50. Japanio: K. Ueda 202,64. Nederlando: W.A. Verloren van Themaat 25,00. Anonima 600,00. Sumo ĉi-jara 3 611,91.

ĜENERALA KASO: Finnlando: Pentti Silander 35,46. Diversaj malgrandaj: 8,54. Sumo ĉi-jara 2 240,12.

PROPAGANDA KONTO: Nederlando: J. v.d. Teems 10,00. Sumo ĉi-jara 124,32.

BUDAPEŜTA OFICEJO: FR Germanio: R. Paintner-Trumpp 545,00. Sumo ĉi-jara 4 951,80.

Al ĉiuj tre koran dankon! UEA

NOTO: Kiam vi skribas al UEA, multe helpas nian laboron, se vi indikas vian uea-kodon. Dankon pro atento!

Esperanto en radio

La kompleta tabelo aperis en nia junia numero, kaj ni planas aperigi la novan en decembro aŭ januaro. Informojn pri Esperanto en radio sendu al la redaktoro de la rubriko: s-ro G. Larglantier, 29 bd. Murat, F-75016 Paris, Francio.

RADIO PEKINO ekde la 30a de oktobro disaŭdigas sian esperantlingvan programon per novaj ondlongoj:
11.00-11.30 GMT al Japanio kaj Koreo: 41.01m (7315 kHz), 30.42m (9860 kHz);
13.00-13.30 GMT al Sudorienta Azio: 25.67m (11685 kHz), 19.78m (15165 kHz);
20.00-20.30 GMT al Eŭropo: 40.16m (7470 kHz), 32.03m (9365 kHz), 30.10 (9965 kHz);
22.00-22.30 GMT al Centra kaj Suda Ameriko: 30.42m (9860 kHz), 26.05m (11515 kHz).

RADIO VATIKANO pro la sezona horŝanĝo en Italio estas nun aŭdebla laŭ GMT de 20.00 ĝis 20.15 dimanĉe kaj de 06.10 ĝis 06.25 ĵaŭde.

KIAM VI PAGAS VIAN KOTIZON POR LA VENONTA JARO, PENSU PRI TIUJ, KIUJ PRO TRANSPAGAJ AŬ ALIAJ PROBLEMOJ NE POVAS KOTIZI. EVENTUALE ESTAS TRO POR VI PAGI PLENAN KOTIZON DE UNU EL TIUJ KONTRAŬVOLAJ NEMEMBROJ. SED, STUDU LA KOTIZTABELON EN NIA OKTOBRA NUMERO, ĈAR POR TIAJ LANDOJ ONI PAGAS MALPLI. DANKON!

Antaŭdankon por la frua pago de via kotizo por la jaro 1983

ĈI TIU LIBRO JUS GAJNIS LA PREMION "INFANLIBRO DE LA JARO"

LA KRABO KUN ORAJ PINĈILOJ

Kopirajto© 1980, CASTERMAN

LA UNUA AVENTURO DE TINĈJO (vidu la paĝon 193)

Por 1-9 ekzempleroj la prezo estas 26 FRF (francaj frankoj), plus 5 FRF por afranko. Ekde 10 ekz. rabato de 25%, kaj ekde 50 ekz. rabato 33,3%, plus la kutimaj 10% por sendokostoj.

GRAVA NOVAĴO: Se vi jam mendis malpli ol 50 ekzemplerojn, vi povas nun mendi la mankantajn ekzemplerojn por atingi (aŭ superi) tiun kvanton, kaj vi ricevos rabaton de 33,3% **por la tuto.**

Atentigo: Ekde la 1-a de januaro 1983 la prezo estos 27,30 FRF.



Mendu tuj!

Francoj mendu senafranke ĉe:
ESPERANTIX
Libre-réponse 8538-75S
75742 PARIS CEDEX 15

Alilandanoj mendu ĉe:
ESPERANTIX
11 rue Frédéric Magisson
F-75015 PARIS
FRANCIO

Anoncetoj

Tarifo: Ĉiu vorto kostas 0,90 guldenojn (unu internacian respondkuponon). Pri la enhavo de la anoncetoj kaj anoncoj ne respondecas la redakcio. Ni donas nenian rabaton pro la ripeta aperigo de la anoncetoj.

Zamenhof-monero: La Libroservo de UEA akiris nur kelkajn ekzemplerojn de la 100-zlota arĝenta monero, eldonita de Pola Nacia Banko en 1979. Prezo: 75,00 (por Nederlando 88,50) gld., plus 15,00 gld. por afranko en registrita sendaĵo.

Por kuraĝigi novajn gelernantojn kaj konvinki kolegaron, sendu saluton al: Esperanto, Mereway Upper School, Northampton, Britio NN4 9BU.

La kurzoj de la Stelo estas haveblaj, regule ses-foje en la jaro, kontraŭ pago de 30.00 Steloj aŭ ekvivalento en nederlandaj guldenoj, (senpage al kunlaborantoj kaj al abonantoj de *Semajna bulteno*). Petu informojn de M.E.E., Postbus 25041, 3001 HA Rotterdam, Nederlando.

Ĉe-metode instruadu ankaŭ vi, private aŭ lerneje, laŭ: *Esperanto laŭ la patrina metodo*, 320 paĝoj, GM 50,00! 50-instruhora kabareto lernigas **esperante** kaj **germane** ĉiujn demandojn kaj respondojn de la ĉiutaga konversacio! August Weide, Nordalbingerweg 65, D-2000 Hamburg 61, poŝtĝirkonto Hamburg 150 58-209.

Ideala feriejo por esperantistoj estas Gastejo Edmond Privat de Kultura Centro Esperantista, CH-2301 La Chaux-de-Fonds, Svislando. Petu informilon!

30-jara instruistino kolektas naciajn pupojn kaj deziras korespondi per bildkartoj: Neli Georgieva Dimitrova, ul. Neofit Bozveli 22A, et.3, ap.8, BG-9700 Ŝumen, Bulgario.

105 geesperantistoj, 14–68-jaraj, atendas viajn leterojn. Adreso: Esperanto-klubo, PK 61, BG-5180 Polski Trambeŝ, Bulgario.

Kun ĉiuj landoj, pri ĉiuj temoj deziras korespondi: s-ro Stanisław Fischer, ul. Bułgarska 8/8, PL-64-100 Leszno, Pollando.

Kiel diri? (Lentaigne). Mimeo. 5 000 zamenhofaj esprimoj pri 67 temoj. "Vera trezoro!" 9 gld. ĉe UEA. Nepre havinda.

30-jara komencanto serĉas korespondantojn: s-ro Pavel Jačka, Havlíčkova 3887, CS-767 01 Kroměříž, Ĉeĥoslovakio.

Neniam forlasu vian kredon en Esperanto, ĉar tiuj, kiuj serĉas kun fideleco, trovas la vojon gajni siajn vivrimedojn pere de la Esperanto-instruado. Hodiaŭ ne ekzistas pli granda servo al la homaro, ol instrui kaj disvastigi Esperanton, ĉar de niaj klopodoj dependas la paco. Parzival, Esperanto-Schule, Juravorstadt 13, CH-2500 Biel, Svislando.

Eldonejo -librejo SONORILO

L'espéranto dans l'enseignement, d-ro Pol Denoël. Ĵus aperis la dua eldono! 30p. 23cm. Informbroŝuro pri Esperanto kaj instruado. Prezo: 100 Bfr.

Initiation théorique et practique, d-ro Pol Denoël. 96p. Ilus. 22cm. Bind. Gramatika lernolibro kun bonaj klarigoj pri gramatikaj konceptoj. Lernolibro plej taŭga por publikaj kursoj! Prezo: 180 Bfr.

Gluafiŝo: Internacia lingvo Esperanto: Ĵus aperis! Formato 16,6 x 7cm. Prezo: 25 Bfr.

Kartoj por la Nova Jaro: Serio de 4 diversaj koloraj kartoj en 5 lingvoj (kun kovertoj). Prezo: 60 Bfr.

Eldonejo-Librejo SONORILO estas peranto i.a. de: *Heroldo de Esperanto* (Bfr.520); *El popola Ĉinio* (1 jaro: Bfr.180, 2 jaroj: Bfr.300, 3 jaroj: Bfr.420); *Monato* (Bfr.960).

Librejo SONORILO vendas pli-malpli ĉion momente disponeblan en la Esperanta libromerkato! Bonvolu atenti, ke al ĉiuj netaj prezoj de libroj aldoniĝas sendokostoj: por la mendoj sub la valoro de 100 gld. – 20%, por la mendoj super 100 gld. – 10%. Niajn eldonaĵojn vi povas mendi ĉe la Libroservo de UEA, ĉe via kutima libroservo, aŭ rekte ĉe: Eldonejo-Librejo SONORILO, Doornstraat 22, B-2610 WILRIJK, Belgio.

Nova kaseto!

Unuafoje en Esperanto! La plej konataj israelaj kantoj ("Hava Nagila", "Haleluja" kaj multaj aliaj), kantitaj de profesia kantistino. 40-minuta kaseto, kun akompana ilustrita libreto (20p. 22cm). Prezo: 18,00 guldenoj. Mendu ĉe la Libroservo de UEA, aŭ rekte ĉe la eldonisto (kie la prezo inkluzivas sendokostojn): Junulara Esperanto-Ligo Israela, P.O.K. 22041, Tel Aviv 61220, Israelo.

HEROLDO DE ESPERANTO

LA PLEJ OFTA INTERNACIA GAZETO DE LA ESPERANTO-MOVADO

De 62 jaroj je la servo de la Internacia Lingvo

- 17 numeroj jare
- Aktualaj ilustritaj raportoj el la tuta mondo
- Junulara, instruista, literatura rubrikoj, librorecenzoj, listo de fakaj artikoloj en Esperanto
- Duobla Kongresa numero, kalendaro de internaciaj renkontiĝoj kaj kongresoj
- Libera Tribuno de la legantoj, anoncetoj, ŝak-problemoj, krucvortenigmoj, foto-filmo
- Sciencaj suplementoj, ktp.

Jarabono: 15,00 usonaj dolaroj aŭ egalvaloro.

Abonebla ĉe la Landaj Perantoj aŭ ĉe UEA (33,00 guldenoj; por Nederlando 34,32 gld.)

Mendu provnumeron ĉe la redakcio: Calle de Juan Ramón Jiménez n-ro 28, 6° A, Madrid 16, Hispanujo

Redaktorino: Ada Fighiera-Sikorska

Ĉina monata gazeto en Esperanto

EL POPOLA ĈINIO

varbas abonantojn por 1983

1. Periodo de la abonvarba kampanjo:
Ekde la 1-a de novembro 1982 ĝis la 28a de februaro 1983. Ĉiu, kiu faras abonon aŭ reabonon en la abonvarba kampanjo, povas profiti rabaton de 20% kaj senpage ricevi koloran kalendaron en Esperanto.

2. Abonprezoj:

(abon-periodo)	(aktualaj prezoj) Gld.	US$	(rabatitaj prezoj) Gld.	US$
1 jaro	12,60	6.00	10,08	4.80
2 jaroj	21,00	10.00	16,80	8.00
3 jaroj	29,40	14.00	23,52	11.20

(La supraj prezoj ne validas en landoj de Azio, Afriko kaj Latin-Ameriko. Legantoj en tiuj landoj bonvolu atenti la enlandan EPĈ-anoncon aŭ konsulti la peranton.)

3. Abonvarbado estas bonvena. La abonvarbanto povas sendi la kolektitajn abonilojn kaj pagojn al la loka peranto, petante ke la lasta notu lin kiel abonvarbanton, aŭ rekte al la ĝenerala distribuanto. Post plenumo de la aboniloj la ĝenerala distribuanto sendos al la abonvarbanto ĉinstilajn memoraĵojn.

4. Tuj abonu ĉe via loka peranto aŭ ĉe: Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam (poŝtĉekkonto 37 89 64). **Nederlandaj klientoj** bonvolu aldoni 4% por la enlanda imposto. Abonebla ankaŭ rekte ĉe la ĝenerala distribuanto: Esperanta Sekcio de Centro de Ĉinaj Eldonaĵoj (GUOJI SHUDIAN), P.O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio.

Petu prospekton kaj specimenon ĉe Guoji Shudian!

Kontraŭmilita bildstria romano



La plej ampleksa verko en la bildstria ĝenro en Esperanto. Ĝi en strečа maniero rakontas la hororon pri la unua atombombo en 1945. Tre flua traduko, kun lerta eltrovo de pluraj onomatopeaj esprimoj.

Nudpieda Gen (1973), Keizi Nakazawa (1929 -). Eljapanigis Yukio Izumi. Tokio: Rondo Gen, 1982. 4+284p. Bildstria romano. 21cm. Prezo: 30,00 gld. **Mendebla ĉe la libroservoj de UEA, JEI kaj KLEG.**

Katalogo 1983/84

En aprilo 1983 aperos nova eldono de la plej granda (ĉ.300 paĝoj) movada librolisto – Katalogo de la Libroservo de UEA 1983/84. Ĉar ĝi estas unu el la plej vaste distribuataj eldonaĵoj en Esperanto (10 000 ekzempleroj), la Katalogo estas ideala loko por reklami librojn kaj aliajn eldonaĵojn en la Internacia Lingvo. Pri la reklamkondiĉoj petu informojn ĉe la Libroservo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam.

jam kompletigita plena verkaro de zamenhof?

Nu, preskaŭ! Aperis ĝis nun dek dikaj, luksaj volumoj. La tuto estas aĉetebla kiel kompleto por 390,00 gld. La unua volumo ("unuaj libroj por esperantistoj") ne plu aĉeteblas ekster la kompleto. Aliaj 9 haveblas unuope (po 39,00 gld). Aperis ankaŭ du "kromkajeroj" (po 33,00 gld). Mendeblaj do estas: ▪ la inkunabloj de esperanto ▪ ni laboru kaj esperu! ▪ antaŭen al la laboro! ▪ tamen la afero progresas! ▪ hebreo el la geto ▪ kun gradaj paŝoj eksterlanden! ▪ klopodis organizi, sed vane! ▪ por kaj kontraŭ reformoj! ▪ mortinta, sed senmorta! ▪ Kromkajeroj: ▪ senlegenda biografio de l.l. zamenhof ▪ korespondaĵo ludovikologia ▪ Ĉio ĉe: uea, jei, kleg.



eldonejo ludovikito